

Sennacieca Revuo

La Safanoj devas igi individuoj
kiuj per sia organizaĵo havos
plej ampleksan kaj plej ob-
jektivan mondrigardeblecon.

Organo de la
Tutmonda Laboristaro

Antaŭe
Esperantista Laboristo

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 1000 kr.; Belgio, 9 fr.; Bulgario, 50 lev.; Ĉeĥoslovakio, 25 kr.; Danio, 6 kr.; Finnlando kaj Baltaj Landoj, 30 mk. f.; Francio, 9 fr. fr.; Germanio, 100 mk. g.; Hispanio 7 pes.; Hungario, 140 kr. h.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 guld.; Norvegio, 6 kr.; Polio, 750 mk. p.; Portugalio, 250 cent; Rumanio, 50 lev.; Svedio, 6 kr.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1¹/₄ dol. La Landoj kurzsuferantaj (rilate al franca franko) pagu prefere per ŝtataj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj landoj pagu laŭvole: monbiletoj, poŝtmandatoj aŭ bankĉekoj (tiuj ĉi estu trateblaj en Paris). — La germanianoj (nur ili) sendu la monon al nia agento en Leipzig, Kdo. F. C. Richter, Sommerfelderstr. 44, poŝtĉeko 45170; la alilandanaj abonantoj al ni mem en Paris. — La abonoj komenciĝas nur en Januaro aŭ en Julio.

REDAKCIO: **E. LANTY**

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: **L. GLODEAU**

177, Rue de Bagnole — PARIS XX (Francio)

2^a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda Frankfurt am Main

12—16 Aŭgusto

Sabaton vespere je la 7a horo 232 gesatanoj el 12 landoj plenigis la kongresejon. K.doj el Leipzig komencis la kantadon de la „Internacio“, sin akompanante per kordmuzikiloj. La ĉeestantoj hore kunkantis.

Fino Ottilie Ponne deklamis belegan prologon verkitan de Satano Sproeck (Berlin) kaj estis multe aplaŭdata.

K.do Roth, salutis kaj bonvenigis la Kongresanojn en la nomo de la Frankfurta grupo. Li diris, ke kelkaj anoj estis persekutataj de la polico, sed spite tion ili ĉeestas la Kongreson, kaj ke ni devas agi kontraŭ ĉiuj malpermesoj, ke ni devas laboradi por la intereso de la tutmonda proletario. Li dankas la organizantojn de S.A.T., kiuj plenumis malfacilan taskon. Liaj vortoj estis longe aplaŭdataj.

Poste li legis telegramon bondeziran de la Satanoj de Chemnitz.

K.do Banmer respondas dirante, ke oni troe dankas la Centran Organizacion pro ĝia laboro, kaj li gratulas la Frankfurtajn Satanojn, kiuj aranĝis la Kongreson.

K.do Lerchner en la nomo de la Leipzig'aj Satanoj prezentas ruĝan rubandon por ornamo la Frankfurtan flagon. Same faras k.do Muribo (Kristiania).

K.do Roth esprimas siajn dankojn al la donacintoj.

K.do van Aelst delegito el Bruxelles transdonas dezirojn de la malgranda tiea Sat-grupo kaj esperas, ke la Kongreso estos granda sukceso; la Bruxelanoj faros sian eblon por pligrandigi la anonon.

K.do Barthel transdonas la salutojn de la Franca Framasonaro.

K.do S. J. Smith (London) transdonas salutojn de la „Dimanĉa Rondo“ (London).

K.ino Suĵadinova (Rusino) paroladis pri la nevigleco de la virinoj kaj vokis la virinaron perfektigi en la lingvo, ke ili laboru serioze kaj aliĝu al Satanaj grupoj — ke ili faru sian eblon por malhelpi estontan masbuĉadon. Ŝia parolado ricevis grandan ovacion.

K.do Remers (Düsseldorf) alportas salutojn de la tiea grupo kaj esprimas la esperon ke ili batalados ĝis la lasta revoluciuolo troviĝos inter niaj vicoj.

K.do Schwartz, je la nomo de la Laborista Ligo de la Ruĝa Kruco germana, deklaris sian varman simpatian por esp.o, aparte por la Kongreso de S.A.T.

K.do St. Frickart bonege kantis „Apud la Weser“ akompanata ĉe la fortepiano de S.ino Maria Barthel-Edler.

K.do Roth proponis ke ni elektu Prezidanton por la Kongreso; — K.do Banmer proponis du Prezidantojn, unu el Francio unu el Germanio, kiel simbolo de interpopola frateco. K.do Deubler (München) montris ke tio estas ne regula kaj ke laŭ la tagordo Prezidanto devos esti elektata ĉe la unua laborkunsido morgaŭ. — Unuanime akceptita.

K.do Roth sciigas ke Dimanĉon okazos komuna tagmanĝo kaj invitas partoprenantojn. Kosto 40 markojn.

K.ino M. Barthel-Edler ludis fortepianon.

K.do Roth sciigis ke la unua laborkunsido komenciĝos je 9a horo akurate Dimanĉon matene kaj petis ke ĉiuj estu fruaj. La oficiala fermo de la kunsido okazis je 9.15 kaj poste gekamaradoj interbabiladis kaj interkonatiĝis malfrua horo.

Dimanĉa kunsido

La 1a laborkunsido komenciĝis je la 10.15. K.do Roth malfermis la kunsidon kaj admonis la ĉeestantaron je pli

kaj Glodeau (Paris). Kiel Telegramkomisiono estis elektataj la kamaradoj: Deiters (Cassel), Modest (München) kaj Guihéneuf (Paris). — K.do Deubler (München) plendas pri la decido de la komisiono pri la rajtigiloj; lia rajtigilo subskribita de la Prezidanto kaj Sekretario de la München'a grupo valoras nur 2 voĉojn, sed la rajtigilo de k.do Goldstein (Dresden) valoras 42 voĉojn tial ĉar ĉiuj delegintoj subskribis.



Partoprenantoj de l' Iia S. A. T. Kongreso

da akurateco. Li antaŭlegis la alvenintajn bondezirojn. K.do Lerchner donacis en nomo de la Uns-produktiva... (preĝejo de nia Revuo) al la Satanoj belegan mapon enhavantan memordediĉon, poŝtkartojn ktp. — La ĉeestantoj elektis kiel samrajtajn Prezidantojn la k.dojn Raguier (Paris) kaj Lämmerhirt (Leipzig). En nomo de la lernejskoloj konsciencaj parolis la instruisto Dr. Zschech (Mainz) kelkajn vortojn. "Ni havas preskaŭ la saman ideon. Ni laboras por similaj celoj. Ni, reformantoj de la lernejoj, volas konstrui la konstruaĵon de la homaro. Via lingvo devas helpi por interkomprenigi la popolojn. Ni devas disŝiri la landlimojn. Estas neceso, ke esp.o estu enkondukata en la lernejoj." Proponis k.do Banmer nur voĉdoni per membrokarto — (akceptite). Raguier proponis elekti komisionon por kontroli la rajtigilojn — (akceptite). Oni elektis la kamaradojn; Roth kaj Heck (Frankfurt), Beyer (Düsseldorf)

K.do Banmer deklaras ke tiu decido estas regula, laŭ la nunaj statutoj kiujn ni devas respekti — dumĝise ili estos modifitaj; cetere la subskribo de iu ajn sekretario de loka grupo estas oficiale senvalora, ĉar ne ekzistas da S.A.T. grupo, sed nur individuaj S.A.T.anoj.

K.do Banmer, sekretario, raportas pri la agado de la Asocio dum la pasinta jaro. Ni resumu kelkvorte lian longan paroladon. Li sciigas, ke, je la 10a aŭgusto, la nombro de la anoj estas 1342, el 300 urboj, el 18 sektoroj, el 33 landoj. — Li atentigas pri la varbado de Subtenantaj Membroj, precipe de proletariaj organizaĵoj; ja, ne nur la alta kotizo de tiuj membroj nutros la asocian kason, sed ankaŭ la pezo, la influo morala de la organizaĵoj faciligos, helpos al la disvastiĝado de S.A.T. Poste, li tuŝas la eldonaĵojn de S.A.T.; ĉiuj kompetentecoj estas bezonataj por la preparo de la dua Jarlibro; kelkajn vortojn pri "Tri verkoj

de Tolstoj“, kaj “For la Neŭtralismo“; li esperas rapidan elvendadon de tiu-ĉi broŝuro, la plej bona propagandilo por S.A.T. ĉe la esperantistaro. Kompreneble, ĉar ni estis ĝis nun en konstrua periodo, tre simpla estas la statistiko de la servoj donitaj de S.A.T. al siaj membroj sed ni devas antaŭvidi ĉiujn eventualaĵojn, eĉ la militon; en tiu lasta kazo, S.A.T. povos doni gravan servon, ĉar “supozu ke milito eksplodu ree inter Germanio kaj Francio, nu, la devo de ĉiuj alilandaj S.A.T.anoj estos helpi ĉiel al ĉiuj membroj, kiuj forkuros el sia lando militanta por eviti mobilizadon“. Kaj tio ne estos la malplej revolucia ago de nia Asocio.

Per kelkaj komparaj ekzemploj k.do Banmer montras la diferencon inter “supernacieco“ kaj “sennacieco“ inter Ligo de l'Nacioj, Ruĝa Kruco, U.E.A. unu flanke kaj S.A.T. aliflanke. Li malkovras la “konservativecon“ de la unuaj, kaj la revoluciecon de S.A.T.

Fine, li pruvas la potencon de S.A.T. per la baroj, kiuj lastatempe stariĝis sur ĝia vojo. Persekutado policista de la germanaj anoj, kaj militdeklaro de la franca Ministro kontraŭ esp.o, kiu, en la manoj de revoluciuloj, minacas la naciismon.

K.do Glodeau, administranto de S.R., priparolas 3 ĉefajn punktojn: la financa situacio, la abonantaro kaj la estonto de nia Revuo. Per kelkaj ciferoj li montras, ke nia gazeto povis daŭre aperi nur dank' al malavareco de kelkaj kamaradoj... kaj dank' al tio ke ni ĝin eldonas en Leipzig; li gratulas k.dojn Richter kaj Lerchner kiuj akceptis zorgi pri tiu eldonado. Nun, Sennacieca Revuo eliras 5000-ekzemplere; sekve ĝi estas potenca organo, la plej grava el la esperantlingvaj revuoj.

Sed se la situacio estas pli fortika ol antaŭ unu jaro, tamen la flanko financa estas ankoraŭ observinda, kaj ni timas, ke baldaŭ la abonoj de la altkurzaj landoj ne plu povos kompensi la malgajnon de la kurzsufertantaj; ĉar nia abonantaro apartenas precipe al tiuj ĉi. Sekve, ni estas devigataj modifi iomete la abontarifon. — Cetere eĉ post tiu plialtigo de abonprezo, nia Revuo estos la malplej kosta el la esperantlingvaj gazetoj.

Post varma alvoko pri varbado de abonantoj, k.do Glodeau finas sian raporton jene: “ni ne krii Vivu Esperanto sed Vivu la Revolucio, kaj uzu Esperanton por la Revolucio“.

K.do Guihéneuf (Paris) legas la raporton de la redaktoro de S.R., kiu forvojaĝis Rusion kaj ne ĉeestas la kongreson. En tiu raporto estas dirite, ke k.do Lanty deziras forlasi la oficon de redaktoro, se troviĝas k.do preta por lin anstataŭi. Tro peza estas por li tiu tasko, ĉar li devis ĝis nun prilabori ĉiujn rubrikojn; plie estas dezirinde, ke la presejo kaj la redaktejo troviĝu en la sama urbo, aŭ almenaŭ en urboj ne malproksimaj unu de alia. El tiu raporto ni citu la jenon:

“Permesu al mi, kamaradoj, starigi antaŭ vin hipotezon. Ni supozu, ke S.R. fariĝis dusemajna kaj tridekdupaĝa; ke ĝi havas valoran enhavon, kiun tradukas kaj represigas kamaradoj el ĉiuj gravaj urboj; ke S.A.T. estas dekmilmembra; ke ĝi havas bone funkciantan informservon; ke ĝi varbis multe da organizaĵoj kiel membroj subtenantaj kaj kelke da famuloj kiel membro-aprobantoj; nu, ĉu en tia stato estus riske antaŭdiri ke esp.o baldaŭ finvenkos en la proletariaj rondo. Nia voĉo tiam estus aŭskultata, tial ke ĝi ne estus malplena sono, sed forto sin apoganta sur faktoj.“

“Nu, tiu hipotezo ne estas fantazia revo, sed efektivebla, se ĉiuj k.doj, jam grupiĝintaj en S.A.T. volos tiu-

direkten kaj unuece alceladi sian energion. Nia juna organizaĵo ne plenumos sian mision, ne atingos sian celon, se ĝi ne sukcesos en tiu koncize skizita entrepreno.“

Notinda fakto el la raporto estas, ke la Redaktoro ricevis dum la jaro 27 diverslandajn gazetojn en kiuj troviĝas artikoloj represitaj el S.R. Tiuj represoj estas certe pli multnombraj, sed ofte oni forgesas sendi al la Redaktoro ekzemplerojn el la koncernaj gazetoj kaj la raportanto aldiras:

“Ĉu en ĉiu urbo, kie troviĝas satanoj, iu el ili tradukis kaj klopodis por represigi artikolojn? Ne. Nur kelkaj k.doj plenumis tiun taskon. Mi volas do profiti la okazon por atentigi ĉiujn pri la varbopovo al esp.o de tiaj represoj. Kiam tiamaniere ni sukcesos interesi al nia afero redaktorojn de nacilingvaj gazetoj per havigo al ili de valoraj informoj, ni sukcese povos peti, ke fine de ĉiu represata artikolo estu aldonata noto pri esp.aj kursoj aŭ lernolibroj. Kaj tiele rapide venos tempo kiam la nure porvarba propagando fariĝos nenecesa.“

Pri la lingva demando estas dirite:

“Estas certe riproĉebla fakto, ke neologismoj estas troveblaj en la gazeto. Sed mi tamen opinias, ke tio ne estas riproĉinda. S.R. estas iel teknika organo; kaj neniu serioza esp.isto povas aserti, ke por pritrakti teknikajn temojn ne estas necese enkonduki novajn vortojn. Cetere kelkiuj ŝajne ne scias, ke jam nia lingvo pliriĉiĝis je tri oficialaj aldonoj. Kaj okazas, ke tiu, kiu posedas nur malnovan vortareton povas erare opinii, ke iu vorto estas neologismo, dum ĝi estas tamen oficiala...“

“... Pri dubaj formoj, eminentuloj iafoje diris: *La uzado decidus*. Bone. Sed por ke la uzado decidu oni devas allasi la liberecon uzi...“

“... Certe la egaj konservativuloj pravus dirante: *Nur per severa disciplino ni venkos*. Kvankam evoluemulo, mi konsentas kun ili pri tiu aserto. Sed disciplino ne signifas *sklavecon!*... En nia lingva fako, *komprenebleco* devas esti la limo netransirenda; kaj tiu netransirendeco difinas nian disciplinon. Kaj perfekta *tradukpoveco* de iu ajn ideo estas la trakurebla kampo de nia libereco. Esp.o devas fariĝi vere vivanta lingvo, kaj por tio ni penadu akordigi la principon de libereco kun tiu de disciplino. Sufiĉas por tio, ke oni konsideru la ambaŭ konceptojn laŭ la leĝoj de la vivo, kaj ne laŭ metafizika vidpunkto...“

Samkiel la Redaktoro permesas al si kaj al siaj kunlaborantoj certan liberecon rilate la lingvan vidpunkton, same ankaŭ li faras rilate al la diversaj politikaj tendencoj reprezentantaj en S.A.T.:

“S.R. devas informi la legantaron ne nur pri iu partio, sed pri ĉiuj. Ĝiaj paĝoj devas speguli la ĝeneralan bildon de la revolucia movado en ĉiuj landoj... *La Satanoj devas iĝi individuoj, kiuj per sia organizaĵo havos plej ampleksan kaj plej objektivan mondriĝardeblecon!*...“

“Unu el la taskoj de S.R. estas ankaŭ bone informi pri la esp.-movado en rev. rondo. Tio rilatas la rubrikon “Kroniko“. Nu, pri tiu fako nia Revuo ne sufiĉe bone plenumis sian taskon. Sed tio neniel povas esti riproĉata al la Redaktoro, sed al la korespondantoj, kiuj ne sufiĉe akurate sendis sciigojn, aŭ preferis sendi ilin al neŭtrala gazeto. Mi povus citi faktojn kaj nomojn. Sed ne estas mia intenco akre riproĉi, sed nur atentigi la kamaradon pri facile kuracebla malsaneto, kiun kaŭzis multjara kunlaborado en neŭtrala atmosfero, laŭ neŭtrala direktivo...“

Tamen la Redaktoro fuŝuzis multe da tempo legante longajn raportojn pri sensignifaj okazintaĵoj:

“Tiaj raportoj estas eble interesaj por enlanda bulteno, sed neniel por Revuo legata en ĉiuj mondpartoj. Ekscii, ke ĉarma samideanino bele kantis aŭ deklamis antaŭ dudek samideanoj kaj estis varme aplaŭdata neniel povas interesi tutmondan legantaron... Kio ĉefe interesas la seriozulojn, estas scii kiom da lernantoj ĉeestis la *lastan lecionon de esp.a kurso* (pri tio oni estas tre silentema plej ofte); kiel rilatas la gvidantoj de politik — kaj fakorganizaĵoj al nia movado ktp. . . .”

“... Por ke funkcii bone nia presorgano, estas necese, ke ĝi varbu *kompetentajn* kaj *fidindajn* kunlaborantojn en ĉiuj landoj; . . . estas necesege, ke oni sendu al mi nur presindaĵojn, ke oni sendu ilin en oportuna tempo kaj legeble skribitaj. Ĉiu bone notu en sia memoro, ke mi devas sendi la presotaĵon al Leipzig unu monaton antaŭ la apero de l'koncerna n-o., ĉar estas neeble aperigi nun la Revuon en Paris. . . .”

K.do Lantý finas sian longan raporton per la jenaj vortoj:

“Ni esperu, ke S.A.T. fariĝos sufiĉe multnara, sufiĉe monhava por certigi vivrimedojn al S.R. ebligantaj ĉiudusemajnan aperadon kaj dungon de ĉefredaktoro. Tiun tagon mi kun plezuro eksiĝos kun ioma fiereco pro la venkitaj malfacilaĵoj. . . .”

K.do Raguier fermis la kunsidon je la horo 12,15.

Je la 4a posttagmeze estis multnombra ĉeestantaro en la popolklerigejo (Volksbildungsheim) kie okazis internacia laborista festo. La varma aplaŭdado pruvis, ke ĉiuj estis kontentaj pri la prezentaĵoj. S.ro Seleger, magistrata reprezentanto, salutis la gekongresanojn en nomo de la urbo, kaj li ĝojis, ke la internacia laborista esp.-kongreso okazas en la trafik- kaj komercurbo Frankfurt. Li diris, ke hodiaŭ la urbestro de ia mezgranda urbo ne plu povas malestimi esp.on. Frankfurt ĉiam montris grandan intereson por internaciaj rilatoj, ekzemple la internacia specimenfoiro jam de 2 jaroj uzas esp.on kun granda sukceso. Ankaŭ en la lernejoj oni faris provojn per esperanta instruado kaj li esperas, ke tre baldaŭ revenos la okazo enkonduki esp.on en la lernejoj. La parolanto gratulis ankaŭ S.A.T. pro la elekto de la fama verkisto Romain Rolland kiel honorprezidanto. — Je la fino de sia parolado li deziris al S.A.T. la plej bonan sukceson. — Prof. Dr. V. Szerenyi-Uczhorod pritraktis la problemon de proletaria atlaso (kun murbildoj). Li montris, ke la teorio de Malthus koncerne la problemon de la plimultigo de la popoloj kaj la neceso de militoj estas erara. Li pruvis, ke sur la tero anstataŭ 1800 milionoj da homoj povas loĝi 9000 milionoj. — Post la fino de la programo ĉiuj kontentigitaj iris hejmen.

Lunda kunsido (matene)

K.do Lämmerhirt malfermis la kunsidon je la horo 10 kaj legis la alvenintajn telegramojn. — K.do Raguier proponis komisionon por trastudi la proponojn el diversaj landoj. Oni elektis la kamaradojn Goldstein (Dresden), Banmer (Paris), Manske (Berlin), Deubler (München), Roth (Frankfurt), Piron (Paris) kaj Nonnenmann (Stuttgart). — K.do Raguier dankis en nomo de la Kongreso al la Uns-Presejo Leipzig por la donacaĵo. — La 3 raportojn de la dimanĉa kunsido akceptis unuanime la ĉeestantoj. — La Dresdena grupo proponis ŝanĝi la § 2 de la statutoj tiamaniere ke post la vorto “esperantista” oni aldonu la vortojn: kiuj ne apartenas al iu burĝa esperanta organizaĵo.

K.do Banmer proponis aldoni esceptojn en tiuj urboj, kie ĝis nun ne ekzistas S.A.T.-grupoj aŭ tie, kie oni havas

praktikan profiton el tia aliĝo. La propono de la Centra komitato pri tiu ĉi paragrafo estis akceptata. — K.do Deubler protestis pri la voĉdonadmaniero. — Fino de la kunsido je la horo 12.

Lunda kunsido (posttagmeze)

La 3a kunsido komenciĝis je la horo 2,30. K.do Pešek (Ĉeĥoslovakio) parolas en la nomo de la Ĉeĥoslovakia ligo Laborista esperantista, kiu enhavas proksimume 500 membrojn. En Ĉeĥoslovakio estis fondita Laborista ligo esperantista, februaron de tiu ĉi jaro. Ĉar la ligo konsistas el membroj de diverspolitikaj partioj lab. kaj volas ne aliĝi al ŝajne komunista S.A.T., li demandas ĉu tiu opinio estas erara aŭ ne.

K.do Burda aldonas ke eble la k.do Pešek forgesis ke ne la tuta ligo povas aliĝi, ĉar do la kotizo pagota al S.A.T. estus por ĝi tro alta (oni pagas 2 Kr. por membro jare) pro tio ne estas ebla aliĝi la tuta ligo sed la izoluloj de ĝi nepre povas nun aliĝi. — K.do Banmer diras ke al nia Asocio devas aliĝi ĉiuj Esperantistoj, kiuj akceptas la Statuton sed la ĉefafero estas ke ili estu revoluciuloj. La patriotoj, eĉ socialistaj, restu ekstere de S.A.T.

K.do Raguier esperas ke la k.doj Pešek kaj Burda klarigos la demandon al siaj ĉekaj kamaradoj kaj incitos ilin pri studo de la Statuto kaj aliĝo al nia Asocio kiel individuoj, ĉar S.A.T. ne povas akcepti grupojn.

Nun sekvas peto, ke sportistoj kaj gimnastikuloj ĉeestu kunvenon post la nuna laborkunsido.

K.do Raguier pro laceco petas, ke oni liberigu lin de la Prezida seĝo, ĉar li jam estris du kunsidojn.

Proponita de k.do Goldstein (Dresden) ke k.do Velland (London) anstataŭu k.don Raguier — akceptite.

La Prezidanto legas leteron (de k.do Baton, Praha) kiu tuŝas la lingvan aferon. Banmer altiras ĉies atenton pri la graveco kaj malsimpleco de tiu problemo kiu postulus specialan debaton; li proponas daŭrigi la kunsidon laŭ la tagordo.

K.do Messmer (Frankfurt) plendas, ke Sennacieca Revuo enhavas tro da artikoloj pri komunismo. Kelkvorte Banmer retrosendas la riproĉon al ĝia aŭtoro: “Certe la plejmulto el la artikoloj tendencas al komunismo; sed kiu estas kulpa? Ĉu la redaktoro kiu presigas kion li ricevis, aŭ ĉu la sampartianoj de k.do Messmer kiuj nenion verkas? Tamen, oni ne rajtas postuli de la redaktoro, ke li mem redaktu artikolojn kies tendenco estas kontraŭa al lia konvinko.”

Laŭ k.do Messmer S.A.T. devus eldoni propagandilojn diverslingvajn por propagandi esperanton — malakceptite.

La Prezidanto malfermas la debaton pri la propono de la Centra Komitato, rilata al “aspirantaj membroj”. K.doj Goldstein, Keller, Banmer intervenas. Kiam kaj kiamaniere la aspirantoj fariĝos aktivaj? Jen la dorno de la propono. K.do Mahn (Berlin) opinias ke estos necese ekzameni la esperantlingvan kapablon de la aspiranto; sed tio estas ebla ne ĉie. Fine k.do Migny solvas la problemon “post unu jaro de membreco la aspiranto fariĝos aŭtomate aktiva membro” — aprobite.

K.do Banmer sciigas ke, antaŭ unu monato. K.do Stöber (Linz) varbis kiel anojn 2 policistojn; laŭ la nuna Statuto, la ĝenerala sekretario povis nur... miri kaj enregistri tiujn aniĝojn. Sed, hodiaŭ je la nomo de la Centra Komitato, k.do Banmer petas al kongresanaro la rajton eksigi oficiale la 2 policistojn; li atentigas ke tio neniel suspektigas la fidecon de nia k.do Stöber. Cetere tiu ĉi deklaras, ke la 2 koncernaj policistoj estas pli klaskon-

sciaj ol multe da "laboristoj", kaj ke, en Aŭstrio multe da policistoj estis kaj estos valoraj helpantoj de la Revolucio; resume, li garantias la indecon de siaj varbitoj. — Post tiu deklaro la diskuto tre vigliĝis, ĉar kelkaj k.doj subtenis la opinion Stöber'an. K.do Banmer ĉesigas la disputon, legante la artikolon 3an hieraŭ akceptita de la Kongreso. La voĉdono konfirmas tiun artikolon; sekve la 2 policistoj estas eksigitaj.

La kunsido finiĝas je la horo 5,30.

PUBLIKA KUNVENO

Lundon vespere 14 Aŭgusto 1922

La kongresejo estis plenplena de Kongresanoj kaj publiko el Frankfurt a. Main.

K.do Roth, sekretario de la Kongreso, klarigis al la neesperantistoj ke sekvos paroladoj de Esperantistoj el diversaj landoj kiujn tradukos k.do Mahn, Berlin, en Germanan lingvon. Jen listo de parolintoj:

K.do *Martin Muribó, Kristiana*

„ *Van Aelst*, instruisto, *Bruxelles*

„ *Hugo Raison*, instruisto, *Troyes*

„ *Ernest E. Yelland*, *London*

„ *Rudi Burda*, *Pilsen* (Plzen)

K.ino *T. Sujadinova*, *Baku*

K.do *P. Larivière*, *Paris* (Franclingve tradukis Esperanten k.do Banmer, tradukis Germanen k.do Mahn), reprezentis la Federacion de Scienco, Arto kaj Beletnistiko.

La paroladintoj pritraktis multe da punktoj, ekzemple, la utilecon de Esp.o al la internacia proletariaro, al Scienco, al fratigo de homaro, por eviti naciajn malamojn kaj militojn, kaj esprimis dezirojn ke la lingvo estu tuj instruata en lernejo tra la tuta mondo.

K.ino Sujadinova paroladis pri la "mistera nacio" kiu havas nek lingvon nek leĝojn, reĝojn aŭ regantojn sed samtempe ĉiuj estas kunigitaj per nevideblaj ĉenoj.

La kunveno finiĝis je la horo 10,45, sed dum longa tempo poste kamaradoj interbabiladis ĝis malfrua horo.

Marda kunsido

La 4a kunsido estis malfermata je la horo 9,45 matene. Unue la Prezidanto legis salutojn leterajn de Satanoj el Varsovio kaj Kladno.

K.do Deubler prezentas sian projekton (vidu Julio-No. de "S. R." sub la rubrika: 2a kongreso de S.A.T.).

Rilate la saman proponon leteroj estis legataj de S.A.T.-anoj en Barcelono kaj Lisbono, ambaŭ akceptas la projekton.

K.do Raguier klarigis, ke la ideo de k.do Lanty estas uzi ĉiujn rimedojn por propagandi la revolucion, ĉu per esp.o, ĉu per alia lingvo.

K.do Modest (München) insistas, ke estas devo de S.A.T. propagandi esp.on inter la naciaj komunistaj kaj socialistaj organizaĵoj.

K.do Deubler protestas kontraŭ la maniero de voĉdono, ĉar ĝi ne permesas al la delegitoj, kiuj havas pli ol unu voĉdonon uzi ilin. K.do Deubler proponas, ke la delegitoj havu tiom da voĉdonoj kiom da membroj ili reprezentas. (Por la propono 14, kontraŭ 23.)

K.do Mahn (Berlin) opinias ke, dum tiu ĉi Kongreso oni devas respekti la Statuton, sed la sperto montras ke tiu voĉ-

donmaniero estas ne taŭga; sekve en la estontaj Kongresoj, ĉiu Kongresano voĉdonos nur por si mem; cetere, ni ne forgesu ke la Kongresoj estas nur proponrajtaj kaj ne decidrajtaj. — 25 por, 8 kontraŭ.

K.do Keller (Breslau) invitis la germanajn Satanojn al kunsido por pritrakti la gazetservon je la horo 1,30 posttagmeze.

Fino de la kunsido je la horo 12.

Marda kunsido (posttagmeze)

Antaŭ la malfermo de la kunsido k.do Roth sciigis pri la ekskurso al Koblenz. Poste malfermis K.do Lämmerhirt la kunsidon je la horo 3. — La materialo, kiun antaŭlegis k.do Raguier pri lernejreformoj ktp. transdonis la kunsidintoj al S.R. La ĉeestantoj aliigis la § 15 laŭ la propono de Manske (Berlin): "Ĉiu sektoro elektas novan komitatanon por si se la estinta ekzigis" (kontraŭ: 7 voĉoj). — Akceptite.

La k.doj Mahnske (Berlin) kaj Goldstein (Dresden) proponis, ke oni forstreu el S.R. la anoncojn de la poŝtmarkkolektantoj. — Malakceptite.

La Centra komitato proponis ke tiu grupo, kiu volas inviti la 3an Kongreson devas anonci tion al la *Centra oficejo*, por ke ĝi povu publiki la invitproponojn en la proksima no. de S.R. — Akceptite.

K.do Glodeau demandis pri la mezaj horsalajroj de la diversaj landoj por fiksi la kotizon.

La propono de k.do Goldstein estonte ne plu elekti honorprezidantojn oni malakceptis. La ĉeestantoj aprobis la protestrezolucion al la Prusa Ministerio por internaj aferoj, koncerne la polican persekutadon, kies suferis, antaŭ kaj dum la Kongreso, kelkaj k.doj.

Je la nomo de la Paris'a Komisiono, k.do Guihéneuf submetis al la Kongreso projekton de rezolucio, kiu estis unuanime akceptata. (Vidu la tekston pli malsupre.)

La Kongreso finiĝis je la horo 5,30. Ĉi faris grandan impreson al ĉiuj partoprenantoj. Antaŭ kaj poste ĉiuj kunsidoj oni kantis la "Internacion".

Merkrede okazis ankoraŭ 2 gravaj paroladoj de la k.doj Prof. Dr. Szerényi (Hungario) kaj Mahn (Berlin). K.do Szerényi parolis pri la problemo de la proletaria atlaso, kun 10 murbildoj kaj k.do Mahn pritraktis la nutraddevon laŭ Popper-Lynkens.

Je la horo 7 vespere estis liberaj interrilatoj en la Kongresejo. — Jaŭdon matene je la horo 7.55 forveturis kelkaj kongresanoj per fervojo kaj vaporŝipo al Koblenz. — Laŭ notoj de la protokollintoj k.do Yelland kaj Kolb.

Gvida rezolucio unuanime akceptita

La 2a Kongreso de S.A.T. konsiderante:

- Ke la Asocio jam transpaŝis la konstruan periodon kaj nun staras sur principe firmaj bazoj;*
- ke la membroj devas kutimiĝi al eksternacia sent-, penskaj agad-kapablo;*
- ke la vivpovo de S.A.T. dependas ĉefe de la konstanteco kaj seriozeco de la rilatoj inter la membroj;*
- ke la presorgano estas la plej trafa intermembra ligilo;*
- ke ni devas zorgi por havigo de monrimedoj al la Asocio.*

Sekve de tiuj motivoj la 220 sennaciuloj, kunvenintaj ĉe la 2a Kongreso de S.A.T. atentige alvokas al ĉiuj anoj:

- ke ili uzu kiel eble plej ofte esp.on;*

2. ke ili atente legu la oficialan organon, traduku ĝian enhavon kaj klopodu por represigi ĝin en nacilingvaj gazetoj, tiel diskonigante la uzatecon de esp.o kaj **Sennacieca Revuon**.

Tre insiste alvokas al ĉiuj verkokapablaj kamaradoj, ke ili kunlaboru al la Revuo per sendo de raportoj pri la vivkondiĉoj, pri la politiko, ekonomia laborista ktp. movadoj, tiamaniere, ke S.R. fariĝu la pli riĉenhava fonto, kie la legantoj povos ĉerpi fidindajn kaj objektivajn informojn.

Atentigas la gekamaradaron pri la graveco de varbado de subtenantaj membroj (precipe organizaĵoj), ĉar tiel ni povos ricevi monrimedojn, kiuj ebligas pli ampleksan agadon de S.A.T.

Sendas al ĉiuj S.A.T.anoj fratecan saluton kaj instigon, ke ili ĉiel klopodu por disvastigi, kreskigi nian Asocion, kies rolo devas fariĝi pli kaj grava por akceli la proletarian tutmondan revolucion.

Kongresaj impresoj

La "Dua" estis ja plezuriga kaj kontentiga kongreso. Niaj Frankfurt'aj amikoj meritis ĉies gratulojn pro siaj penoj. Ĉiufake la organizado estis taŭga kaj tia taŭgeco estas ĉiam grava kondiĉo por sukceso.

La ĉefa trajto de tiuj debatoj estas la rimarkinda bonordo kaj la frata interkompreno kiuj ĉiam regis. Ti-kiuj kutimas ĉeesti la kongresojn de niaj naciaj proletariaj organizaĵoj (sindikataj aŭ politikaj) certe aprobos deziregon mian, por ke niaj unulingvaj naciaj kongresoj ĉiam okazu en simila malkonfuza atmosfero!

Alia ĝojiga trajto: la malnova esperantista (poresperanta) spirito, pli kaj pli malaperas. Ni rajtas esperi ke baldaŭ ĝi estos anstataŭata de vere revoluciema, klara kaj klas-konscia spirito.

Ni ne miksu malsamajn aferojn. La esperanta propagando estas loka aŭ nacia tasko, ĝi estas prizorginda sed kvazaŭ flanka afero. Nia SATa, sennacieca agado intencas *utiligi Esperanton por niaj proletariaj revoluciaj celoj*; ĉi-tiu tasko estas multe pli grava, ĝi postulas ĉiujn kaj ĉies penojn. Cetere, nia SATa agado mem, *la praktika utiligado de esperanto estas la plej afika maniero ĝin propagandi!*

La iniciatoro de S. A. T. jam multfoje diris: *«Esperanto estas bona ilo, sed nur ilo, ĝi neniel estas celo.»*

Ni ĝojas ĉar la plimulto da kongresanoj aprobis tiun opinion. Espereble, malmultnombraj kontraŭuloj konvinkigis je la sperto de baldaŭaj okazantaĵoj.

* * *

Jen notinda fakto: ĉie, kie la laboristoj kaj revoluciemuloj sin grupigis aparte; ĉie, kie ili aparte propagandis en siaj propraj organizaĵoj, ili sukcesis starigi vere viglajn, vivantajn-kaj revoluciemajn grupojn. Duobla profito: por la proletariaj interesoj, kaj ankaŭ por la esperanta afero. — Multaj ekzemploj pravigas tiun konstaton (Leipzig, Trojes, Köln, k. c.)

Jen pripensindaĵoj por kelkaj kamaradoj, precipe por tiuj de London, Brüssel, Orléans, kaj ankaŭ kelkaj parizanoj.

En tiuj urboj, ĉu pro lokaj cirkonstancoj, ĉu pro propraj preferoj, niaj kamaradoj timas apartigi la laboristan esperantan movadon. Per sia propono, la Dresden'a grupo vigle atakis tiun konduton, kaj celis trudi al SAT-anoj la ekzigon el neŭtralaj (burgemaj) esperantaj organizaĵoj. Tia radikaleco allogis multe da kamaradoj, sed kelkaj pensis ke ĝi estus disrompinta nian junan asocion. Je la nomo de Centra

Komitato, kamarado Banmer, kvankam aprobante la celon montritan, aprobis proponon samcelan, sed pli oportuna kaj pli neradikala; ĝi efikos pli malrapide *sed pli trafe laŭ interesoj de la Asocio*.

Estas ja utila avertilo por ti-kiuj *malŝparas* sian agemon ĉe malamikaj kluboj. Ili meditos pri la ŝatindaj rezultatoj ricevitaĵ de ĉiuj apartigitaj laboristaj grupoj; ili direktos klopodojn siajn laŭ tiu vojo ĉar, ĉe la 3^a Kongreso, la radikaleco de la Dresden'a propono estos tute pravigata kaj verŝajne akceptata de ĉiuj, kun tiama aprobo de Centra Komitato.

* * *

Ĉar la SAT-anoj ricevis nefrue la jarlibron, la kongresantoj ne diskutis pri la sektora demando; ili ankaŭ ne balotis pri nova Centra Komitato.

Cetere la nuna dissektorigo de nia Asocio estas kritikata kaj kelkaj Kamaradoj opinias, ĉu prave ĉu malprave, ke alia sistemo estus pli simpla kaj pli praktika. Oni legu atente, en ĉi-tiu numero, la iniciatan proponitan de K^{do} Marcel Boubou.

Baldaŭan solvon tiu temo postulas: *Gilbert Raguier*
(daŭrigota)

Diskutindaj pripensoj

En S. A. T. nur devas regi sincereco. Ni ĉiuj estu sufiĉe fortaj por aŭdi senkolere ian ajn kritikon. Eble mi malkontentigos kelkiujn; sed ĉu tiuj preferus hipokritan silenton?

Tuj frapadis miajn okulojn la ĝentileco reganta meze de nia Kongreso. Oni ege sin intersaltis, intergratulis kaj, anstataŭ dezirinda kamaradeco, starigis ia *fisinjoreco*. Mi demandas ĉiujn delegitojn laboristajn, ĉu vi vere celas *ĝentilan sinjorecon*?

Certe, ĝentileco trafas por alproksimigi malsamopiniantojn eĉ oni povas pardoni, ke ĝi helpu rilatojn inter nesamseksuloj sed inter ni, revoluciuloj, ĝi nur estas *misuzilo de tempo*.

En nia rondo, vere kora kaj simpla manpremo pli amikigas ol kutimaj salutdemandoj kaj senfinaj dankoj.

Samkiel en aliaj esp. rondoj, mi bedaŭrinde rimarkis en nia medio amuzemon. Komprenoble, ni ne estu tro severaj; rido estas eble plej bona filozofio, sed ĝi kontentigas nur infanojn kaj . . . verajn saĝulojn. Ne estante tre saĝaj, ni ne restu tamen infanaj.

Amuzemo ne estas *dandismo*, sed fakte kondukas al ĝi, kaj ni ne estos tro vigle atentaj por forigi el la revoluciaj rondoj la regantan opinion, ke „*esp.ismo estas dandismo*“, kvazaŭ *okupilo de grandaj infanoj*. Sincere, ni devas konfesi ke esp.istoj, eĉ revoluciemaj, bruadas kaj propagandas (ili opinias) precipe per festoj, ekskursoj ktp . . . Mi ne asertas ke tia propagando ne estis fruktodona pri kvanto sed mi spertis, ve! ke ĝi malhelpis ege nian porvarban agadon inter seriozuloj.

Ni ne anstataŭu kvaliton per kvanto. Ekzemple: En Frankfurt okazis „Je honoro de la delegitoj Internacia laborista festo en Volksbildungs-Heim“.

Reprezentanto de la loka registaro parolis pri esp.o kiel pacigilo kaj laŭdis nian prezidanton Romain Rolland, kiu tre certe ne estis vere honorata per tia *registara* laŭdado . . .

Poste okazis festo „*je nia honoro*“ t. e. muziko, komuna trinkado kaj danco . . .

Mi ne asertas, ke parolado de la „fiŝtelisto“ estis maloratoreca, ke muziko estis malbona, ke *naciaj* dancoj bavaraĵ estis malartaj; sed mi nur dezirus scii kion pensas la ĉeestintaj revoluciuloj Frankfurtaj neesp.istaj pri la *revolucio de esp.o* kaj *sennacieco de S. A. T.?!?! . . .*

Nu, kamaradoj, bedaŭrinde ni devas konfesi, ke eble la organizkomitato de la Kongreso ne agis, maltrafe, ĉar plejmulto de la delegitaro estis kontenta pro tiaj festoj!!

Parolemo estas unu el la plej egaj fuŝigaĵoj de la proletaria movado, samkiel en aliaj kongresoj ĝi ekstarigis en S. A. T. Kamaradoj bezonis paroladi dum laborkunsidoj kaj alie por nenion diri; rimarkinde estas, ke ĵi eĉ ne legis S. R. inter la du kongresoj, ĉar ili denove proponis akceptitajn punktojn jam publikigitajn. Cetere, paroladi pri temo kiun oni ne studis funde, pri kiu eĉ oni ne havas koncizan proponon, tio ne estas serioza. Ĉiuj ja ni deziras gloron; sed almenaŭ ni konsciu, kiam ni ne laboris kaj tiam silentu...

Aliokaze, maljunuloj ne timis paroli pri sia tridekjara servo en la esp.istaro, kiel referenco por S. A. T., forgesante ke tia longdaŭra servo ofte ŝtelis ilian juĝkapablecon pri la novaj propagandmetodoj. La nuraj referencoj estu taŭga agado al niaj celoj.

S. A. T. ne estas tiel riĉa pri *sennacieco* kaj *revolucieco*! Ekzemple kamaradoj proponis *sincere* ŝanĝojn en ĝia funkciado, kiuj tre certe fuŝus la *sennaciecon*.

Pli mirige ankoraŭ estis la diskuto pri akcepto de policistoj en nia medio; oratoroj ne timis defendi tiun akcepton, dirante ke en Aŭstrio kaj Ĉekoslovakio policistoj estas revoluciemaj. Certes mi ankoraŭ konas en Paris policistojn bonkorajn kaj homamantajn, sed ni ne forgesu ke, samkiel masonistoj konstruas domojn, la policistoj, defendas registarojn kaj ke, eĉ en Aŭstrio kiam, pro malsato, baldaŭ la popolo ribelos, policistoj mortigos la ribelantajn. Sen tia laboro kion farus la policistaro?

Cetere, la temo estas iom pli profunda. Ĉu la *profesio* celanta „perforte ordigi aliajn, hipokrite esplori kaj denunci la ŝtelistojn ordinarajn“ ne estas ege danĝera por nia Asocio, en kiu nur devas regi fidindeco...

Lastan jaron en Praha, mi jam konstatis religiemon en la burĝa kongreso. Ĉar mi ne ekstarigis, por kanti la esp. himnon, certe multuij pensis, ke mi ne estas sufiĉe bonedukita por konscii pri tia respektindeco. Vi antaŭvidas kiel akre mi kontraŭbatalos ian ajn religiemon en S. A. T.; sed tiu temo grava necesigus almenaŭ grandan artikolon kaj hodiaŭ, ni nur atentu pri kvazaŭ *mondlingva religiemo*...

Ankoraŭ tro multaj el niaj S. A. T. revoluciuloj ne povas aŭdi ion pri „ido“ sen kvazaŭ kolere kontraŭstarigi; vole nevole ili laboras kontraŭ sukceso de la universala lingvo kaj precipe kontraŭ akcepto de esp. o.

Tre certe malmultaj povis studi *funde* tiun temon laŭ la teknika flanko kaj ridindaj estas ti-kiuj aludas malfacilecon de ido, dum eĉ scienculoj ne interkonsentis pri tio. Ni do ne okupiĝu pri tiu temo. Ni nur scias, ke la du lingvoj estas tiel similaj, ke esp.isto komprenas rapide idon kaj idisto esp.on.

Por ke S. A. T. plugu profunde la kampon en kiu ni semos la bonan grenon, per enkonduko de internacia lingvo en la praktiko, estas nepre necese, ke ĉiufake, ĉiukaze la S. A. T.-anoj sin liberigu je la dogmeca, burĝeca spiritaĉo, kiu ĝis nun putrigis la mondlingvan movadon.

La „sataneco“ ne estu nur nova etiketo, sed signo de objektive juĝanta spiritstato. La S. A. T.-anoj estu homoj, ne ŝafoj, kaj ili preferu akrajn ripocojn, sed sincerajn, ol mielecajn laŭdojn hipokritajn.

En tiu penso mi verkis tiun artikolon, kun la espero, ke ankaŭ same sincere oni rebatos mian opinionon, se oni juĝos ĝin erara.

R. Guihéneuf

Oni ordinare laŭdas nur por esti laŭdata.

La ROCHEFOUCAULD

Diskutejo

Pri la sektororganizsistemo

Nia amiko Marcel Boubou, helpanta sekretario de l' Edukistara Internacio, kies kongreso okazis en Parizo samtempe kiel nia Dua, skribis al mi antaŭ kelkaj semajnoj interesplenan leteron entenanta rimarkojn kaj instigon pri nia nuna S. A. T. a dissektorigo.

Laŭ propono mia, la dua kongreso aŭdinte la legadon de ĉi tiu letero, decidis unuvoĉe ĝian publikigon en S. R. por ke ĉiu studu la temon diskutota ĉe la 3a Kongreso. — G. R.

Mi tre ŝatas la geografian senlandolimecon de S. A. T. — t. e. geografia sennacieco. Mi kredas la sektorsistemon aplikebla, ĉar oni povas ĉiam apliki, kion oni forte pensis, forte volas. Mi proponas por studado nedefinitive — jenon:

Estu uzata por dissektorigo de S. A. T. la tiel nomata plej logika daŭbosistemo.

Kiam mi ekvidis punkto-liniojn sur la geografia karto, mi tuj ekpensis pri novaj „limoj“ artefaritaj, ne tutmonde akceptataj, sed elpensitaj de kalkulisto multe prilaborinta.

La dissektorigo nuna de S. A. T. ne povas esti definitiva statutaĵo, ĉar la sektoranara multeco estas variebla laŭtempe.

Ĉu la dissektorigo estas bazita sur egaliga divido de tutmonda loĝantaro, ĝi ŝajnas al mi erara — ĉar la disdivido nur povas concerni S. A. T.

Ĉu la dissektorigo baziĝas sur egaliga divido de tutmonda S. A. T. anaro, tiakaze estas neeble definitive limigi sektoron longitude latitude por difini unu voĉon al ĉiu, ĉar sektoranaro jen plimultiĝas, jen malplimultiĝas, kaj *principo de S. A. T. estas jena: ĉiu S. A. T. ano estas samrajta kaj malsammultaj sektoranoj ne povas rajti samnombrajn voĉojn.*

Mi petas ke vi studu definitivan kaj logikan sistemon, kiu neniel pensigas pri novaj landolimoj (ĉar ŝajnis al mi ke ofte la sektoroj estis difinitaj laŭ nacioj kompromite).

Pro tio, ke tero estas sfera, kaj, tute sendepende de homa volo, estas rigardata laŭ meridianoj malsamtempe de patro suno, estas tute memkompreneble, ke teranaroj sur tutmondo sin grupigu laŭ spaco kaj momento en kiu suno „bontagas“ ilin.

La universala disdivida sistemo de la tutmondo estas geometria — ĝi estas la *daŭb-sistemo* laŭ kiu estas nune plej ĝenerale kalkulata la landaj horoj.

S. A. T. konsistus el 24 duoblaj sektoroj (Nordaj kaj Sudaj = 48). La 1a sektoro estus la daŭbo de la 1a horo; la 2a sektoro, de la 2a horo... la 24a sektoro estus la daŭbo de la 24a horo.

Paris kuŝas en la 1a sektoro norda. Libreville kuŝas en la 2a sektoro suda. Kelkaj marsektoroj ne havas loĝantojn (ekz. en Pacifiko) sed tute ne grave! ĉar la sektoranoj rajtas ne samnombrajn voĉojn.

Tre simpla kalkulo ebligas difini la nombron da voĉoj por ĉiu sektoro. Ĉu S. A. T. anaro tutmonda konsistas el 1200 membroj, tiakaze la sektora koeficiento estas: $1200 : 48 = 25$ anoj.

La plej multanara sektoro (la 2a daŭbo de la 2a horo) konsistas proksimume el 375 anoj kaj rajtus: $375 : 25 = 15$ voĉojn. Kompreneble la malmultanaraj sektoroj devus grupiĝi du-, tri-kvarope (eĉ se necese laŭ kontinentoj) por atingi sumon da 29 anoj kaj rajti 1 voĉon. Tute sammetode, la multanaraj sektoroj povus disdividiĝi laŭ sektoretoj (duonsektoroj) por atingi ekvilibre ne tro multajn voĉojn.

Tute egala estas la afero, ĉar la voĉnombro estas kalkulata laŭ proporcio kun la satan-nombro kaj la dissektorigo restas ĉiam bazita laŭ longitudaĵ metidianoj kaj laŭ samhoreco. Ne plu bezoni estas speciala propra geografia karto.

Informservo ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda Organizprojekto de O.-Dresden

Konsiderante, ke la laboristaro de unu lando kvazaŭ avidas al objektivaj informoj pri la laborista movado, pri la vivkondiĉoj proletariaj de aliaj landoj ktp., konsiderante, ke S. A. T. laŭ artikolo 1a de sia Statuto deklaras, „Esp. on praktike utiligi al la klasceloj de la laboristaro tutmonda“, S. A. T. nepre devos fariĝi la plej fervora kaj konfidinda peranto de tiaj informoj.

Ĝis nun la informintersanĝo troe dependis de hazardo kaj de korespondemo de la korespondantoj kaj ofte enketoj pro manko de spertoj kaj kompetenteco ne povis esti prirespondataj.

Por ke regulita, tuja kaj detala informintersanĝo estu ebla, certigota, la informservo nepre estu organizita.

En Jarlibro 1922 paĝo 39 k.do Banmer montras la vojon surpaŝindan, surpaŝendan. Li celas starigon de informfakoj kaj donas ekzemplon kiumaniere la informservo povus funkcii. Sed la citita procedo ne sufiĉe certigas nin, ke ĉi supre diritaj malhelpaj estos forigitaj el la informintersanĝo.

Ni bezonas organizon, per kiu:

1. la demandito estas devigata nepre, tuje kaj detale informi la demandinton,
2. estas certigata al ni, ke la interkomunikiĝo estu kiel eble plej facile kaj rapide.

Sekve mi volas montri manieron, kiu eble taŭgas kiel kontentiga solvo pri ĉi tiu demando.

*

Grave estas, antaŭe konsideri jenajn tri punktojn:

1. La organizo povas esti nur laŭlanda. Sed tiel estiĝus organizo ekster la laŭsektora; fakto kontraŭstaranta la fundamenton de S. A. T.
2. La enketonto tuj sciu, kien direkti sian informpeton. Estu ne bezono al li, antaŭe traserĉi la lastatempe aperintajn n.ojn de S. R. aŭ apartan adresaron, kies adresoj eble ĉiunonate ŝanĝiĝas.
3. La informservo estu kontrolebla.

*

Propono al 1: En kelkaj urboj de ĉiu lando estu Kamaradoj, kiuj prilaboru fakon adekvatan al siaj kapabloj. Iliaj adresoj ne estu publikigataj en S. R. aŭ kolektitaj en aparta adresaro, sed ili estu nur ĉe la akto de la koncerna Komitatoj. Ekzemple: Germanio apartenas al tri sektoroj. La adresaron de ĉiuj germanaj fakprilaborantoj estu transdonita al ĉiuj tri komitatoj, kiuj kompreneble devas esti daŭre informataj pri eventualaj personsanĝoj en la fakoj.

Propono al 2: La demandanto sendu sian enketon al unu el la tri Komitatoj. Kiu ajn el tiuj tri ricevas la informpeton, tiu sendos ĝin al la koncerna fakprilaboranto, kiu siavice senpere respondas la demandinton.

Jena skemo vidigu al ni klare la procedon:

Al 3: Se enketinto ne ricevas respondon de la fako, li turnu sin al ĉi tiu Komitato, al kiu li siatempe direktis sian informpeton.

La Komitato enrigardas la kontrolregistron, el kiu vidiĝas, ke la enketo pere de li jam delonge estas forsendita al la fakprilaboranto. Tuj li admonas la fakprilaboranton al lia devo.

*

ĜENERALAĴOJ.

La fakprilaborantoj daŭre kaj senpere transdonu materialon al S. R. Por la Jarlibro ili faru ĝeneralan statistikon aŭ raporton (komparu proponon Banmer).

La Administracio transdonu sciigon pri la ekzistado de nia informservo kune kun la adresoj de la Komitatoj ankaŭ al ne-S.A.T.-aj laboristaj Esperantistaj grupoj de la tuta mondo.

Kion celis Dresdena propono al Glea-kongreso en Düsseldorf

En raporto pri Glea-kongreso en n^o 9 de S. R. oni legas: „K.do Köckeritz, je la nomo de la Dr. grupo, proponis, ke G. L. E. A. malstarigu; ĝiaj grupoj simple aniĝu al Sat. La lasta parto de tiu ĉi frazo estas miskompreniga. Pro tio necesiĝas koncisa klarigo. K.do K. defendis la Dr. proponon konsiderante la neceson de plenumo de ambaŭ taskoj, la porvarba kaj la porpraktika. Ne oni preferu la porpraktikan malatentante la porvarban taskojn kaj inverse. Racie ambaŭ estu partigitaj inter la ekzistantaj proletariaj Esperantistoj kapablaj en unu loka grupo. Se unu de ambaŭ nur iom estus malatentita, eĉ pro tio neprogesus la alia.

Neniam k.do K. estas dirinta: la grupoj simple aniĝu al Sat. Nur la perfektuloj kaj duonperfektuloj aniĝu akceptinte la Statuton. Farante al la Glea-kongreso malstarigan proponon, la Dr. k.doj ĝin nur faris pro tio, ĉar ili deziris tute novan organiz-strukturon porvarban. La strukturo de Glea estas malnoviĝinta. Ĝi similas al partiorganizaĵoj, kvankam la vivkondiĉoj de Lab. Esp. movado estas tute aliaj; eĉ pro tio kaŭzas elspezojn nenecesajn, ĉar en ĝi ekzistas institucio nenecesa. Anstataŭ okupi sin per eldono de taŭga propagandmaterialo, fakvortaro politika por nia movado, taŭga lernolibro konforma al nia medio ktp., ĝi nur estas kolektejo de grupkomunikoj kaj ofte devas okupi sin per aferoj tute negravaj. Pri la unuaj la distriktcentroj estas kompetentaj kaj povas plenumi pli bone la edukadon de grupoj novaj ol malproksima Centrejo. — La Dr. propono celis starigon de propagandileldonejo — ankaŭ rekomendinda por lingvoregionoj aliaj.

Estas kompreneble, ke tia institucio ankaŭ necesigas fundamenton kaj tiurilate estas proponita jena. Oni fondu propagandkomunaĵon por Germanlingvio, kiu starigu Propagandileldonejon kaj estu administrata de Komisiono, kies anoj loĝu en sudeja urbo. Ĝia sola tasko estu eldono de taŭga materialo porvarba ktp. Ĝi estu subtenata de komitatoj balotataj en laŭplane starigitaj distriktoj. La komitato estas necesa pro tio, ĉar komisiono nur laboras honorofice kaj aliflanke multe agas laŭ lokaj vidpunktoj. La komitatoj diversloke loĝantaj influu kaj instigu ĝin. En laŭplanaj distriktoj sin formu malpli grandaj, laŭ cirkonstancoj kaj neceso, kiuj ebligas kuneagadon de diversaj grupoj. Nek la Komisiono, nek la Komitato havu ekzekucian karakteron pri organizaj demandoj. Oni lasu al ĉiu grupo plenan liberecon rilate al gruporganizo. —

Ankaŭ pri financaj aferoj estas faritaj proponoj konkretaj. Ekzemple daŭra kotizo ne estu pagata, nur komence por starigi propagandileldonejon. La Instituto vivu per vendado de siaj eldonaĵoj fiksante la prezojn tiele; ke ekzisto estas garantiita. Ĉi maniere oni administras pli racie kaj tiu ĉi sistemo estus preferinda laŭ komercista vidpunkto. Oni ne bezonus membrolibrojn, kvitanbiletojn kaj laŭ tiu ĉi procedo ne estas bezona enkasigi kotizojn; per tio ŝparo de energio kaj mono. Kompreneble, neestanta ano de propagandkomunaĵo tiu pagu pli altajn prezojn. Oni estas aniĝinta per unufoja pago de kotizo. Tia entrepreno certe baldaŭ konkurus kun la burĝaj eldonejoj. La simpligo kaj malmultkostigo de organizaparato porvarba ebligus pli bonan subtenon finance ol la porpraktika organizaĵo, t. e. S. A. T. Jen la motivoj de la Dr. gek.doj.

La k.doj legante atente suprajn liniojn certe konstatos, kiamaniere simpla frazo povas erarigi legantaron.

Senheredigito, 4^a Sektorano.

Malfermita letero al S-ro P. Meden

(okaze de lia letero malfermita de 26. X. 21 al V. N. Devjatnin enpresita en „Esp. Triumfanta“)

Estimata Sinjoro Paŭlo Davidoviĉ!

V. N. Devjatnin bedaŭrinde ne povis respondi al via letero pro sia forveturo al suda Rusio.

Do, kiel Prezidanto de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo, kies vice-Prezidanto li restas, kaj kiel vice-prezidanto de Sovjetlanda Lingva Komitato, kies Prezidanto li estas — mi respondos kun via permeso al kelkaj viaj paroloj, koncernantaj V. N. Devjatnin.

Mi opinias ne utila la diskuton pri la celoj kaj taktiko de la Komunismo.

Mi nur volas ion diri pri la Esperantismo, al kiu vi volas aldoni ion specialan havantan ne la lingvan, sed intime spiritan karakteron.

Mi ne komprenas, kial al la "Marseliezoj" franca, rusa k. t. p. — oni ne povas aldoni ankoraŭ unu specialan "Marseliezon Esperantan?"

Ĉu la nomo de la revolucia himno estas por vi tiom malagrabla? Ĉu vin ĝenas, ke revolucian penson revoluciaj esperantistoj esprimas internacilingve?

Eble al mi ankaŭ ne plaĉas la "Esperantista Katolika Internacio?" Tamen mi opinias, ke se ĝi ekzistas, se ekzistas katolikoj-esperantistoj, — malhelpi al ĝi kaj al ili uzi la vorton "Esperantisto" estus nek eble nek saĝe.

La Mondo malnova krevis, naskiĝis en la mondo novaj ideoj, novaj revoj kaj sopiroj.

La potenco movado revolucia konscie uzas la kulturajn rimedojn de la evoluo.

Ĉu vi volus apartigi la Esperantistaron de ĝia viviga influo de la socia atmosfero? Ĉu vi volus malhelpi al la grupoj revoluciaj uzi Esperanton, konsideri ĝin kiel sian, de ili uzatan, lingvon? Ĉu vi volus malhelpi al ili varbi por siaj idealoj inter la Esperantistaro?

Ŝajnas, ke se vi eĉ tion volus — la rezulto de via volo — estus nula.

La Esperantan movadon evoluantan, movadon tutmond- kaj tuthoman-ampleksan limigi per iaj dogmoj kaj tradicioj eklezieŝajnaj neniu provas.

Kaj tia limigo — estus ĝia morto.

Ni ne diskutos pri tio, per kiaj rimedoj oni povas pli facile, pli sensange kaj pli rapide starigi la pacon sur la tero.

Ĉu la kulturaj filantropiaj amatoraj rimedoj por tio sufiĉos aŭ ne — pri tio povas esti diversaj konsideroj.

Kaj krome la konsideroj esprimataj ofte diferenciĝas de la praktiko praktikata.

Kun via permeso — mi memorigos al vi, ke la "abomena hombuĉado" kaj "kruela mortpuno" tute ne estas iu speciala revolucia elpensajo.

Pri tio multajn pruvojn vi trovos en la okazajoj tute freŝaj ĉiulandaj.

Ni ne volas lasi nian Esperantismen en la verdeto marĉo de la senformaj idealoj de la pasinto.

Ni volas ĝin apliki al la celoj kaj idealoj, kiujn ni aspiras, kaj al kiuj ni servas.

Kaj eble vi konsentos, ke la personoj, esprimantaj sian konvinkon — esperante — tute ne estas tiom kondamnindaj, kiel vi kondamnas V. N. Devjatnin.

La peko de revolucianoj kaj de V. N. Devjatnin konsistas nur en tio, ke honeste kaj ne kaŝite ili esprimas siajn pensojn kaj konvinkojn, ke, malsimilaj al aliaj, ili evitas la dolĉetajn vortojn kiujn ofte sekvas la maldolĉegaj agoj.

Kun firma konvinko, ke posedante ioman pacemon kaj reciprokajn komprenon pri pensoj kaj celoj de aliaj — ni sukcesos.

Kunlabori sur la kampo mondlingva!

Mi restas via Ernest Drezen

Prezidanto de S. S. N.

P. S. Bedaŭrinde la unua mia letero sendita en la komenco de 1922 al "Esp. Triumfonta" kaj "Sennacieca Revuo" perdiĝis.

Mi do bonuzas la ĉeston de K-do E. Lanty en Moskvo por transdoni al li kopion de la letero sendita.

E. D.

Finita la Komedio . . .

En la lasta n^o de S. R. ni publikigis leteron de K^{do} Valentinov pri pseŭdo-decido de pseŭdo-Komisiono por alprenado de helpa lingvo en la „Komintern“ (1).

Post legado de tiu letero, sendita de fidinda K^{do}, neniu esp.isto povis jam plu dubi pri la intriga karaktero de la ĉi-supre aludita Komisiono. Sed tiu letero ne estas oficiala dokumento liverita de „Komintern“. Kaj ni jam spertis sufiĉe la nelojalan agadon de certaj idistoj por kredi, ke sekve de l' publikigo de tiu letero ili konfesos la senvaloron de la informo, kiun ili publikigis en multaj gazetoj diverslandaj.

Ĉar jam de longe mi sopiris vidi proprokule la Mekon de la Mondrevolucio, mi, malgraŭ mia bedaŭro pro neĉesto en nia II^a Kongreso, decidis forveturi Moskvon por finfine reĝustigi tiun aferon.

Tuj je mia alveno mi vizitis la Sekretariejon de „Komintern“, klarigis mian deziron kaj ricevis de K^{do} Rakoŝi la jenajn dirojn kaj oficialan dokumenton, kiun mi publikigas ĉi-sube:

„Kiam naskiĝis tiu Komisiono, regis ĉi-tie certa malordo kaj konfuzo. Ĉio estis ricevebla senpage, kaj multtiuj penis iel ajn ofici por pravigi sian ĉi-tiean restadon. Tiam iniciatis K^{do} Itschner tiun Komisionon. Li tiucele klopodis, ricevis kelke da komplezaj aproboj kaj jen stariĝis pretendema Komisiono pri kiu, ĉi-tie, neniu atentis (2). Cetere Itschner estas eble bona komunisto, sed li havas nenian specialan kompetentecon por okupi sin per tia afero.

Okazis la „Nepo“ (nova politiko). Multaj oficoj estis likvidataj. El tiuj estis tiu Komisiono, kiu fakte neniam funkciis. Do „Komintern“ havis nenian intereson por tiu entreprenado, kiun simple devas esti konsiderata kiel flanka, privata. Nun ni havas solvendaj tro da urĝaj demandoj kaj tute ne povas okupiĝi pri Lingvo Internacia.

Venos sendube tago, kiam ni serioze devos ekzameni tiun problemon. Aliĝas nun al „Komintern“ 50 naciecoj, kaj internaciaj kongresoj fariĝos pli kaj pli komplikaj pro la diverseco de l' lingvoj. Sed, mi ripetas, nun ni ne povas okupiĝi pri la solvo de la lingva problemoj“.

Rakoŝi parolis france; ĉeestis K^{do} Doriot, reprezentanto de la *Komunista Internaciano Junulara*. Mi asertas, ke en ĉi-tiu esperanta rezumo tute speguliĝas la veraj diroj de la Sekretario de l' *Ekzekutiva Komitato* de „Komintern“.

Nu, mi posedas leteron de Itschner en kiu estas dirite, ke li sendis al mi 150 frankojn (svisa valuto) por ke mi havigu al la Komisiono diversajn dokumentojn. Hodiaŭ, spertinte la agmanieron de ĉi tiu K^{do}, mi rajtas demandi: En kies poŝojn falis tiu sumo? Ĝin neniam mi ricevis, kaj tamen dokumentojn mi sendis — kiujn per mia propra mono mi pagis. En kies manojn trafis tiuj dokumentoj? . . .

Naivulo mi estis. Mi ne povis kredi, ke revoluciaj mondlingvanoj, kiuj devas vidi en L. I. nur ilon necesan

(1) *Komunista Internaciano*. Tiu mallongigo jam fariĝis internacia kaj estas ĝenerale uzata.

(2) Tio klarigas kial niaj Moskvoj K.doj apenaŭ aŭdis pri tiu komisiono kaj tute ne atentis ĝin.

por la Internaciano, povas intrigaĉi por alprenigi iun ajn de ili preferatan lingvon, kiam la lingva vidpunkto devas esti por ili nur akcesora, flanka afero.

La faktoj montris mian naivecon. La kamaradoj, kiuj iafoje avertis min, pravaj estis. Nu, bone, de nun pri tiu afero mi ankaŭ volas konsideri ĉion per okuloj de informitulo. Mi diris...

E. L.

„Comité Exécutif de l'Internationale Communiste“.

No. 1455

Moscou, le 14 Août 1922

„Le Camarade E. Lanty, délégué par l'organisation esperantiste „Sennacieca Asocio Tutmonda“, avec l'approbation du Secrétariat International du Parti Communiste Français, venu à Moscou au fins d'enquête concernant les travaux de la Commission d'Etudes pour l'adoption d'une langue auxiliaire dans la III^e Internationale, est informé officiellement que cette commission a été déjà liquidée et que l'Internationale Communiste n'a pris aucune décision concernant l'adoption soit de l'esperanto soit de l'ido“.

Le Secrétariat du C. E. de l' I. C.
Rakoŝi.

Traduko.

Ekzekutiva Komitato de l'Komunista Internaciano.

No. 1455.

Moskvo, 14 aŭgusto 1922

Kamarado E. Lanty, delegite de la esp.organizaĵo „S.A.T.“, kun aprobo de l'Internacia Sekretariejo de l'Komunista Partio Franca, veninte Moskvon, celante enketi pri la laboroj de la *Studa komisiono por alpreno de helpa lingvo en la III^a Internaciano*, estas oficiale informata, ke tiu komisiono estas jam likvidita kaj ke la Komunista Internaciano alprenis nenian decidon ĉu pri adopto de esp.o ĉu de ido.

Sekretariejo de E. K. de K. I.

Rakoŝi.

Pardonemo de la estroj estas ofte nur lerteco por havigi al si amon de la regnanoj.

La ROCHEFOUCAULD

☆

La virtoj perdiĝas en la utilemon kiel la riveregoj en la maron.

La ROCHEFOUCAULD

S. A. T.^a Monkolekto por la Rusaj malsatuloj

11^a listo de monoferantoj

K.do Boubou 25 fr. fr.; K.do E. Bouchard 20 fr. fr.; K.do Dombowitz 10 fr. fr.; K.do Robin 10 fr. fr.; K.do H. Ferez (Straßburg) 140 fr. fr.; K.do Schmitt (Paris) 5 fr. fr.; K.do Papy 5 fr. belg.; Proletaria Grupo de Bottrop (Germ.) 120 mk. germ.; Proletaria Grupo de Lyon (Fr.) 1606,25 mk. germ.; Okcident-Berlin'anoj 75 mk. germ.

Kun la 7^a ĝis 10^a listoj = 487,20 fr. fr.; 57 kr. ĉek., 5 fr. belg.; 1968,25 mk. germ.; 1150 mk. pol.

La produkto de la 6 antaŭaj listoj (proksim. 470 fr. fr.) estis uzata por pagi la unuan ekspedon de nutraĵoj al Rusio (legi la majan numeron).

DIVERSAĴOJ

Tutmonda Asocio por „Internacilingva Scienca Anarĥisma Biblioteko“

Al la tutmonda anarĥiistaro.

Karaj kamaradoj!

Ĉiu el ni scias, kiom gravan signifon por la propagando de niaj ideoj havas la kónigo de la plej gravaj verkoj pri la teorio kaj praktiko de l'anarĥismo en ĉiuj landoj. Sed bedaŭrinde multaj el tiuj verkoj ne estas uzeblaj por la ĉiulanda propagandistaro pro tio, ke ili estas diverslingvaj kaj multaj el ili ne estas tradukitaj ne nur en ĉiujn, sed eĉ en la plej gravajn nacilingvojn. Tia stato tre malutilas al nia afero. Ĝi estas nepre likvidenda.

Por la internacia propagando de l'anarĥismo ni uzu la internacian lingvon! Ni kreu internacilingvan bibliotekon el la plej gravaj verkoj pri la teorio kaj praktiko de l'anarĥismo.

Tiacele ni organizu Tutmondan Asocion por Internacilingva Scienca Anarĥisma Biblioteko, kiun partoprenos ĉiuj k.doj aprobantaj la ĉi-supran proponon kaj dezirantaj helpi al ĝia efektivigo, ĉu per tradukado, ĉu per monrimedoj.

La Asocio elektu internacian sekretariaron, al kiu estos komisiata zorgi pri la organizo de l'esperantigo de nacilingvaj verkoj, pri la redakto kaj eldono de l'„Biblioteko“ ktp.

Por unuavica traduko ni proponas la sciencajn verkojn de la plej granda teoriulo de l'moderna anarĥismo — P. A. Kropotkin, nome:

1. La Moderna Scienco kaj l'Anarĥio (La Science Moderne et l'Anarchie).
2. La Interhelpo, kiel evoluigilo (Mutual Aid: a factor of Evolution).
3. La anarĥisma Moralo (La Morale anarchiste).
4. La Justo kaj la Moralo (Spravedlivostj i nrastvenuostj).
5. Agrikulturo, Industrio kaj Metioj (Fields Factory and Workshops).
6. La Granda Franca Revolucio (La Grande Révolution Française).

La sidloko de l'internacia sekretariato estu en unu el la jenaj urboj: London, Paris aŭ Berlin. Niaparte ni esprimas la deziron, ke ĝi estu en Berlin, ĉar kun la lasta estas ebla pli rapide komunikigi (ĝi estas en la centro de Eŭropo). Ni petas, ke la tiurbaj k.doj senprokraste sciigu nin pri la eblo starigi tuj ĉe ili provizoran sekretariejon. Ĉis tiam ni prenas tiun rolon sur nin.

Ĉiuj k.doj dezirantaj partopreni la laborojn de l'Asocio estas petataj komuniki al ni siajn adresojn kaj informi kion ili deziras traduki (kio estas jam tradukita).

La iniciatantoj jam komencis la tradukon de „La Moderna Scienco kaj l'Anarĥio“.

Permeson por la esperantigo de ĉiuj verkoj de Kropotkin ni ricevis de la aŭtoro mem dum lia vivo.

La Iniciatintoj: A. Levantovskij
J. Zilberfarb

Adreso: Al k.do Zilberfarb, Ribna str. 20, loĝejo 4, Ĥarkov Ukrainlando.

Ĉiuj anarĥiistaj kaj sindikatistaj gazetoj kaj ĵurnaloj estas petataj represi tiun-ĉi alvokon.

Praktika Laboro en la Laborista Esp.-Movado

Por praktike utiligi esp-on en la laborista movado, la *Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj* starigis komisionon nomitan „Nederlanda Laborista Esperanto.Servo.“

Tiu Servo deziras ricevi el eksterlando publikigindajn sciigojn, raportojn aŭ artikolojn pri socialaj, ekonomiaj aŭ politikaj okazintaĵoj kaj situacioj por traduki ilin kaj publikigi en Nederlandaj

laboristaj gazetoj. Reciproke ĝi estas preta sendi sciigojn k. t. p. por publikigo en eksterlandaj gazetoj laboristaj. Tiucele ni serĉas en ĉiuj landoj, esceptante Angl- Franc- kaj Germanlandojn, spertajn kamaradojn, kiuj estas pretaj helpi nin tiurilate.

Kamaradoj tutmondaj! Nur per praktikaj provoj ni povos konvinki la laboristojn pri la utilo de nia lingvo. Por tio ni kunigu niajn fortojn.

Starigu ankaŭ en viaj landoj similan instituton aŭ laboru dividue por tiu ĉi praktika laboro.

Ĉiuokaze ni esperas, ke ĉiu laborist-esp-isto helpos nin!

Konsentantoj skribu al la: Ned. Lab. Esp. Servo, Sekr.: G. P. de Bruin, Alleeweg 9, Enschede (Holland)

Ĉiuj esp. gazetoj bonvolu represigi ĉi tiun alvokon.

Rifuzantoj de militservo * malliberigitaj de la Holanda registaro tre deziras interrilati kun alilandaj rifuzantoj. Skribu al: Ned. Lab. Esp. Servo. Adreso kiel supre.

Tre atentinda peto

La ĉiutaga ĵurnalo la "Daily Herald" (organo de la Brita Laborista Partio) konsentis publikigi de post la komenco de Septembro du fojojn semajne duonkolonon da esperantaĵo. Ĉiuvendrede aperos leciono pri esp-o, kaj ĉiumarde novajaj paragrafoj en aŭ pri Esperanto. Mi skribas por atentigi, ke, se almenaŭ unu serioza korespondanto en ĉiu lando sendus al mi per esp-o ian novaĵon de tempo al tempo, mi povus liveri okulvideblan pruvon de la nuna valoro de esp-o al la tutmonda laborista movado. Paragrafoj de ĝenerala intereso ankaŭ povus esti akceptitaj. Sendante novaĵon pri vivkondiĉoj, oni aldonu ĉiujn necesajn klarigojn. Ekzemple, la prezo de pano k. c. havas nenian signifon por alilandanoj sen sciigo pri la salajro de diversmetiaj laboristoj.

Ĉiun sendaĵon (ordinare limigitan al 200 ĝis 300 vortoj) oni adresu al la sube nomita.

P. J. Cameron

69 Schubert Road, Putney, London, S. W. 15

La nuna situacio de Germana laboristaro

Ondego de indigno trairis Germanion en la lasta tempo pro la mortigo de Rathenau. Estas konstatinde, ke tiu ĉi mortigo nure ne kaŭzis la indignon, kiu vidiĝis en potencaj demonstracioj de la proletariaro. Sed ĝin estigis la serio de mortigoj, kiuj okazis de post 1918, ekz. tiuj de Liebknecht, Luksemburg k. a. La granda amaso de la laboristaro nur nuntempe ekkonsciis, ke la nuna mortigo estas ero de ĉeno, el mortigoj preparitaj de monarkiaj mortigbanditoj — Orgeŝanoj, hokkrucanoj k. a. — subtenata, instigita de *Deutschnationale Volkspartei* — partio de naciigistoj, monarkiistoj. Nur nun konscias la proletariaro pri tio, ke la forigo de gvidantoj respublikanoj estas komenco de kontraŭevolucio.

Tiu ĉi ondego nun jam plimalfortiĝis. Oni denove konfidas la ekzistadon de la respubliko al leĝo, kiu estas akceptita en Germana parlamento, eĉ de partioj entenantaj multajn monarkiistojn. Tiuj reakciaj partioj nur konsentis pro tio, por forigi suspekton de nereкта kunkulpo. Estas bedaŭrinda fakto, ke multe da proletarioj ankoraŭ estas tro lidemaj al malvivaj literoj de leĝo, kvankam ni en tio jam spertis sufiĉan malbonon. Leĝo estas aplikata diversmaniere; ĝia apliko dependas de bonvolo aŭ malbonvolo de la juĝistoj. Estas certe, ke socialistoj, komunistoj suferos per tiu leĝo. Inter niaj juĝistoj, en la ŝtata oficistaro sin trovas multe da

reakciuloj, ne povas esti aliel. Fera balailo necesiĝas por purigi tiun "stalon."

Kompreneble, la lastaj okazintaĵoj forte influas la ekonoman situacion. La Germana mono pli kaj pli senvaloriĝas, dume la vivnecesaj atingis tiajn prezojn altajn, kiam neniam antaŭe kaj ili de tago al tago plialtiĝas. Ĉu ankaŭ la salajroj de laboristaro samskale plialtiĝis? Tute ne. En semajnoj lastaj ni travivis egan prezaltiĝon, sed la salajroj estas preskaŭ samaj kiel antaŭ dekkvar tagoj. Ankoraŭ pli granda iĝas diferenco inter perlaborata salajro kaj realsalajro (deva salajro garantiante sanon k. t. p.) Ĉiumonate oni elkalkulas oficialajn ciferojn statistikajn pri por-ekzista minimumo, (salajro kiu sufiĉas modeste vivi). Sed la salajroj tute ne estas atingintaj la altecon de tiu ĉi minimumo. Tiuj ĉi malaltaj salajroj kaŭzas la proporcie bonan konjunkturon en Germanio, vere ĝi nur estas ŝajnkonjunkturo. Iam antaŭ la militigo estis atestita oficiale, ke la salajro de Germana laboristo estas la plej malalta kompare al aliaj grandŝtatoj, eĉ malgrandŝtatoj. Pro tio oni timis la konkurecon de Germ. kapitalismo. Nuntempe la finkonkureco estas pli granda ol iam.

En Germanio ŝajnkonjunkturo, en landoj bonvalutaj senlaboreco kaj kial? Ĉar en bonvalutaj landoj la produktajoj estas abundaj, oni ne havas eksporteblecon, ĉar malbonvalutaj ŝtatoj ne povas aĉeti la tieajn varojn. Eĉ komercistoj de bonvalutaj aĉetas multegon da varo en Germanio, kiu per la militigo estas ekspluatata je krudmaterialo kaj estas devigata aĉeti la lastan en bonvalutaj landoj.

Laŭ alia statistiko oni povis aĉeti

en jaro 1913		Fino de Junio 1922
40 funtojn da terpomoj	por 1 Mk.	okonan funton da ĉijaraj terpomoj aŭ duonan funton da pasintjaraj.
6 litrojn da lakto	por 1,25 Mk.	okonan litron da lakto.
144 ovojn	por 6,20 Mk.	unu ovon.
8 funtojn da butero	por 10 Mk.	okonan funton da butero
20 funtojn da viando	por 18 Mk.	kvaronan funton da viando.
30 orajn markojn	semajna salajro	100 Mk. monbiletoj paperaj, kiuj valoris 15 orajn markojn.

Sekvanta statistiko oficiala indikas la prezojn de gravaj nutraĵoj kelkaj, je la 11a de Julio 1914 kaj je la sama dato en 1922, same pri la salajro:

Supraj ciferoj indikas klare la mizeron kaj suferon de Germana proletariaro. Sed la prezoj je la 11a Julio denove plialtiĝis. Hodiaŭ la 20a Julio la funto da rizo	kostas 17.— Mk.
" " " butero	110.— "
" " " terpomoj	3.20 "
" " " pasintjaraj	" "
" " " margarino	57.— "
1000	7.60 "
k. t. p.	

La diferenco inter la prezoj iamaj kaj nunaj de vestaĵoj eĉ estas pli altaj. La ekzistanta mizero kvazaŭ nebulumas la spiritan vidpunkton de la suferantoj. Oni kutimiĝis al pligraviĝo de la mizero, oni kutimiĝis je la ĉiutage ricevitaj batoj kaj tio eble estas la plej bedaŭrinda fakto.

Senheredito, 4^a Sektorano.

Por pripenso kaj ago al la kamaradoj!

Sennacieca Revuo povus solvi por la proletaria kultura movado tre gravan taskon. Kaj ĝi devas ĝin solvi. Ĉu ĝi ankaŭ sukcesos, tio dependas sole de la tutkamaradara viveco.

La kultura edukado de la proletario, la alvivvoko de ĝiaj internaj trezoroj, estas demandoj, kies gravecon mem la politikaj partioj jam ekkonis. Multloke ekzistas diversaj kulturaj rondoj, societoj, ktp. ktp., kiuj klopodas zorgi pri tiuj ĉi bezonoj de la laboristaro. La plej granda organizaĵo en tiu ĉi direkto estas la „Proletkult“, kiu estas organa parto de la komunista partio. En Ruslando, kie ĝi naskiĝis kaj de tiam preskaŭ en ĉiu vilaĝo jam estas fondita, la Proletkult estas ĉefa centro de la literatura, arta, ĝenerale kromlernej-eduka vivo, unu el la plej efikaj iloj servantaj la kreon de la nova Homo. — Eksterruslande, kie la proletarion neniu subtenas, kompreneble, la laboro estas pli malfacila. Eĉ ĉe la komunista partio ne estas ĉie organizita la Proletkult. Pro plej diversaj kaŭzoj, inter kiuj estas, ke multloke oni ne scias kion kaj kiel fari. Ofte, pli ofte ol oni pensus, oni trovas proletariajn rondojn ktp., kiujn oni nepre devus malstarigi. Ĉar — en unu el la plej gravaj momentoj — ili disvastiĝas, sub proletaria nomo, eble ŝajne proletarian, sed certe pure burĝan ideologion. Ifoje, ĉar la gvidantoj mem ne estas kapablaj distingi, alfoje, ĉar oni semas „kulturon“ plej facile akireblan, pensante, ke eĉ ne pura proletaria kulturo estas pli dezirinda ol nenia. Ne estas tiel. La burĝa ideologio estas veneno kaj restas veneno en ĉia mezuro, en ĉia okazo. Analizu nur kiom da burĝaj ideologiaj elementoj estas eĉ en klaraj kapoj, en politike tre bonaj komunistoj, kiam pri la familio, seksa vivo, amo, moroj, arto, ktp. ktp. estas la temo, kaj vi vidos, kia efika veneno ĝi estas.

Ni bezonas novan, puran proletarian kulturon, ne ĉar ni deziras novan klasan kulturon, sed ĉar, ni bezonas Homan kulturon kaj sole la proletario portas en si la venontan Homon.

Por la disvastigo de tiu ĉi kulturo estas necesaj la Proletkultoj. Sed por ke la Proletkultoj agu en dezirinda senco, estas bezonata racie organizita material-liverado por la Proletkultoj.

Jen la tasko de S. R. Diversloke iam funkcias Proletkultoj kaj aliel nomitaj, sed samcelaj organizaĵoj, kiuj jam kolektis valoran materialon (antaŭ ĉio niaj ruslandaj k.doj). Multaj organizaĵoj malsatas pro manko de konvena materialo! S. R. devus esti la perilo inter kaj por la tutmondaj ĉi tiaj organizaĵoj.

Goldhamer Géza



PEDAGOGIA FAKO

Instruado pri Historio

La demando estas diskutita tiun ĉi jaron en du internaciaj kongresoj. Dum julio unue en la tria Kongreso pri Morala Edukado, kunvokita ĉe Genève de Instituto J. J. Rousseau, kaj iom pli malfrue en tiu de Edukistara Internacio: tio estas almenaŭ la firma propono de la franca sekcio.

Kleruloj klarvidaj, senpartiaj, grandanimaj, asertas nuntempe, ke post la sangigaj eksperimentoj de 1914—1918 la instruado de Malamo ne plu devas esti. Lernejo pro sia militema edukado havis parton da respondecio en la senbridigo kaj la plenumo de la «krimego», kaj nun temas por la ĉiulandaj geinstruistoj, sin decidi tutlojale ĉu por la homaramaj konceptoj de la pacemaj amasoj, ĉu por tiuj malprogresemaĵoj kaj pereigaj de la hardaj ŝovinistoj.

La ampleksa plimulto, ve! el niaj gekolegoj ne estas pretaj por tuj elektdecidi. Obeemaj ŝtatoficistoj, nutrataj ĉiam kaj ĉiam per la samaj oficialaj abstraktaĵoj ili vojiradas — kun kapo mallevata — sur la vojoj de malnova reĝimo. Dokumentaro partia, tro lokeca sufokas iliajn altruismajn pensojn, subjugas iliajn entuziasmojn, trompkaŝas al ili la mondon malantaŭ remparo el naciaj antaŭjuĝoj, unuvorte surdigas ilin pri la ripetataj voko, klamataj eksterlandlimoj. Kiel ekkonsciigi ilin? Kiel alpeti ankaŭ kaj nia-profite tiun ampleksan konfidon, kiun senpripense ili malavare disdonas alidirekten?

Per simpla sed internacia dokumentaro, mi kredas. Mi legis grandinterese la vokon de la saksa kolegaro (junian numeron de „Novaj Tempoj“), rekomendeganta la sisteman kritikon — de eksterlandaj kamaradoj — de ĉiuj naciaj lernejlaboroj, kaj poste la tutan publikigon de la ricevitaj dokumentoj. La propono ja estas atentinda, sed ĝia realigo ŝajnas al mi longdaŭra. Tial mi proponas al la kamaradaro alian sugestion rapide realigeblan, interesan pro simplaj komparoj, kaj kapablan klerigi rapide la spiritojn.

La abonintoj aŭ legantoj de „Novaj Tempoj“ kaj de „Sennacieca Revuo“ traduku aŭ tradukigu por mi — esperanten — la ĉapitrojn de siaj naciaj historiaj lernejlaboroj, priŝtraktantaj francan Revolucian kaj ĝiajn militojn (de 1789 ĝis 1799). Ili alsendu al mi siajn tradukojn, la librobildojn ankaŭ kiuj ilustras la tekstojn, kaj la afero estos plenumita.

Kiaj estas miaj intencoj? La librobildoj estos apudmetitaj en naciaj serioj, kungluataj sur tabulon kaj zorge etiketataj. Simpla ekrigardo al tiu originala elmontrado de karikaturoj kaj memorigaj monumentoj, kaj la nesciuloj eksentos la naciistajn tromplertaĵojn de la diversaj registaroj.

La historiaj okazintaĵoj cititaj ĉiucapitre estos ankaŭ klasataj nacie kun siaj oficialaj interpretaĵoj. Ĉu vi ne opinias, ke la komparo de ĉi ĉiuj elementoj estos interesa? Kial okazintaĵo estas reliefigita tie ĉi... „forgesita“ tie, „alivestigita“ aliloke?

Ni komprenos tiam, sen ja malfacileco, kiel per tiaj vestaĵoj la „prihistoria Vereco“ (1?) adaptiĝas perfekte al la naciistaj postuloj, kiel ĝi servas mirinde „Deutschland über“

alles", "Rule Britannia", "Francio grandanima" ... k. t. p.

Per niaj dokumentrimedoj ni povos konvinki la honestajn homojn, montri kiamaniere la ekspluatantoj kaj la monarĥoj kulturis la malamojn inter popoloj, kaŝas pro klasnecesecoj nian elementan vivrajton. Ni reliefigos kontraŭe la intimajn necesajn nekontestablajn rilatojn, kiuj unuigas la produktantojn. Ni diros laŭtege, ke la ĝenerala komuna profito dependas de ĉies feliĉo, ke la nuntempaj militoj naskas nur viktimojn, ke estas fine la tempo eduki en niaj lernejoj ne nur Francojn, Germanojn, Anglojn aŭ Rusojn sed civitanojn de l'mondo, Homojn.

A. Testud

*

Mi petas la kamaradojn, traduki aŭ tradukigi, prefere ĉapitrojn el antaŭmilittempaj lernejlibroj. Ili konigos al mi la eldonanton de la libro uzita, la nomojn de ĝia aŭtoro kaj de ĝia eldoninto. Tiuj, kiuj en sia lernejo ne uzas lernejlibron pri historio, bonvolos sciigi al mi la "oficialajn naciajn ideojn" pri la demando, kaj se eble alsendi rilatbildojn.

Vi bonvolos tuj konigi al mi, ĉu vi intencas partopreni la realigadon de mia sugestio. Poste vi uzos necesan tempon por tio. Interŝange vi ricevos la rezultatojn de niaj komunaj klopodoj, kaj se necese iom da mono por kompensi viajn elspezojn. Antaŭan dankon!

Jen mia adreso: A. Testud, 30 rue de la Loire, Firminy (Loire) Francio.

En Rusio

Edukado en Ruĝarmeoj

Sube mi deziras fari mallongan skizon de l'edukado de l, ruĝarmeoj (soldatoj) dum la pasintaj du jaroj, esperante, ke ĝi estos interesa por mia kolegaro.

Mi rajtas diri, ke dum tiuj ĉi du lastaj jaroj (1921—1922) en Rusio estis farita vere grandioza laboro — dum tiuj ĉi du jaroj estis likvidita la analfabeteco inter la ruĝarmeoj, t. e. multaj milionoj ricevis la eblon legi kaj skribi. Lasta temp-limo de l'likvido estis la tago de l'unua Majo de l'kuranta jaro kaj efektive al tiu tago en Ruĝa Armeo estis jam neniu soldato, kiu ne scipovus, legi kaj skribi kaj ne sciis la kvar unuajn aritmetikregulojn. La laboro de la likvido de l'analfabeteco estis tre intensiva. Ĉiuj analfabetuloj-ruĝarmeoj estis apartigitaj en specialajn rotojn kaj liberigitaj de ĉiuj aliaj militokupoj. Al la lernado estis dediĉato de 4 ĝis 6 horoj minimume. Kaj dank' al la fervoreco de lernantoj kaj instruantoj la afero estis finita brile kaj ĝustatempe.

Ne malpli intensiva estas ankaŭ la kultur-kleriga laboro en la Ruĝarmeoj. Preskaŭ ĉe ĉiu regimento ekzistas klubo, kie okazas spektakloj kaj koncertoj, kiujn partoprenas en la plimulto, la ruĝarmeoj mem. Estas en la kluboj diversaj rondetoj. Ekz.:politika, teatra, literatura, matematika, natur-sciencia, agrikultura k. a. Lastatempe precipe intensivan laboron havas la agrikultura rondeto. Ĝin gvidas ĉiam spertaj agronomoj kaj tial ĝi allogas ĉiam grandan kvanton da partoprenantoj, des pli ke granda plimulto en Ruĝa Armeo estas vilaĝanoj. Ankaŭ bone laboras politika, teatra kaj literatura rondetoj. En kelkaj kluboj ekzistas Esperanto- rondetoj.

Sufiĉe multe da tempo estas ankaŭ dediĉata al la sporto: vintra kaj somera. Ĉe la kluboj ekzistas gimnastikaj ĉambroj kaj rondetoj de skiistoj, biciklistoj, fotbalistoj, atletoj kaj aliaj.

Oni povas diri sen trograndigo, ke ruĝarmeoj tre volonte partoprenas diversajn rondetojn kaj tre akurate vizitas iliajn kunsidojn. Rezultato de l'tuta kultur-kleriga laboro estas tre granda. Simpla vilaĝano, travivinta en la armeo unu, du jarojn ne nur scias legi kaj skribi bone, forlasanta ĝin, sed ankaŭ fariĝas sufiĉe klera por kompreni la tutan absurdecon de tiuj superstiĉoj, kiuj regis lin antaŭe kaj eĉ batali kontraŭ ili, reveninte en sian vilaĝon.

Por la estonta tempo estas projektata la plivastigo de l'programo de l'kultur-kleriga laboro en la Ruĝa Armeo. Estas projektata eĉ fondo de l'mezgradaj lernejoj ĉe la ruĝ-armeaj kluboj.

S. N. Anisimov

Instruisto en Ruĝarmeoj (Arkangelsko)

Francisco Ferrer

"Por tiuj, kiuj volas renovigi la edukadon de l'infanaro ekzistas du agadaj peroj: labori al transformiĝo de Lernejo per pristudo de infanaro tiamaniere, ke oni povu science evidentigi kiel difektplena estas la nuna organizado de instruado kaj ke oni enkonduku sinsekvajn plibonigojn; aŭ fondi novajn lernejojn, kie estos senpere praktikataj tiaj principoj respondantaj je l'idealo pri socio kaj homoj konceptita de tiuj, kiuj malaprobis la kutimojn, la antaŭjuĝojn, la kruelaĵojn, la ruzojn kaj la mensogojn sur kiuj estas bazata la nuna socio."

Tion verkis Francisco Ferrer en unu el siaj artikoloj, bedaŭrinde tro malmultaj. Li mem elektis la duan peron fondante en urbo Barcelona la Escuela Moderna'n kaj lia pionira vivo estis de tiu tempo la peza elpago al fortoj reakciaj de l'Reĝeco kaj Eklezio koaliciitaj kontraŭ tiu entrepreno. Mallonga estis tiu batalo, kiu finiĝis antaŭ dek-tri jaroj la 13-an de oktobro 1909.

Ferrer donis al ni pripensindan ekzemplon kaj ni rapide rakontos lian biografion kaj verkon.

Biografio

Ferrer (10 januaro 1859 — 13 oktobro 1909) naskiĝis en hispana urbeto apud Barcelona kaj ricevis kutiman tian edukadon, t. e. precipe religia. Dum la unuaj jaroj de sia juneco li renkontis liberpensulon kaj tio iom decidis sian postan vivon. De tiam li komencis legi kaj lerni dum sia libertempo (unue li laboris ĉe drapvendisto kaj poste kiel oficisto en fervoja administracio) kaj lia spirito plivastigante sin liberigis el religia kaj reĝeca edukado. Li fariĝis fervora respublikano kaj en jaro 1886 partoprenis respublikanan ribelon, kiu ne sukcesis. Tio devigis lin forlasi Hispanion. Li alvenis Parizon kaj sukcesis trovi profesoran oficon. Tie ankaŭ li konatiĝis kun familio Meunier, kies bienojn baldaŭ li ricevis kiel heredaĵon.

En tiu okazo Ferrer ne pensis pri burĝa vivo, kiu tamen ebligis per la heredita mono (40000 frankoj poŝare). Li decidis tuj efektiviĝi vastan projekton: li fondis Modernan Lernejon en Barcelona (1901) kaj ankaŭ eldonejon por disvastigi sciencajn kaj raciajn verkojn. Li tro bone sukcesis: dum la kvin postaj jaroj pli ol kvin-dek lernejoj malfermiĝis akceptantaj la principojn de Moderna Lernejo. Tia sukceso ne povis daŭri en konata lando pro klerikalismo kaj aŭtokrateco!

En 1906 okazis bombatenco kontraŭ la reĝo. La atencanto estis okupita en la eldono de Ferrer. Tiu sensignifa rilato sufiĉis tamen por kulpigi Ferrer pro kunkulpeco kaj tuj oni perforte fermis Modernan Lernejon kaj malliberigis ĝian fondinton. Dum dektri monatoj Ferrer restis en malliberejo; feliĉe malgraŭ ĉiuj intrigoj estis proklamata lia senkulpeco dank' al protesto de ĉiuj famuloj de l' libera penso en Eŭropo.

Ferrer ne senkuraĝiĝis. Atendante pli favorajn cirkonstancojn por malfermi Modernan Lernejon novan kaj pliperfektan li fondis priedukan ligon nome: "Internacia ligo por racia edukado de infanaro" kaj eldonis franclingve kaj hispanlingve revuon: "Renovigita Lernejo". Tiel do pli minacanta ol antaŭe staris Ferrer. Lia amiko kaj kunlaboranto W. Heaford en supredirita revuo skribis (aŭgusto 1908):

"Lia krimo kuŝis en lia pruvo, ke estas tiel facile kaj agrable instrui infanon por ke ĝi iĝu pensanta estaĵo, kiel estas por ke ĝi iĝu kvazaŭ preĝomaŝino."

Tio estis vera krimo, kiun elpagis Ferrer. En julio 1909 okazis striko en Barcelona. En sama tempo Ferrer, kiu loĝis en Paris estis en Barcelona provinco pro familiaj aferoj (morto de nepino kaj malsano de bofratino). Bedaŭrinda samtempeco! Ferrer denove estis kulpigata, malliberigata kaj post honta proceso kondamnata al pafmorto, murdata de la ekleziuloj!

La stultaj krimuloj perfide mortigintaj tiun energian individuon, ageman kaj sagacan geniulon por kontentigi siajn fanatikajn malamojn kredis ankaŭ, ke tiel ili pafmortigos la idealon de Ferrer!

Ili mortigis lian estaĵon kaj pro tio niaj koroj ankoraŭ suferas. Sed lia idealo ankoraŭ vivas kaj nia plej bona respektesprimo al tiu sentima pioniro de racia edukado estas diskonigi lian idealon, rakonti lian verkon kaj komprenigi lian fundamentan ideon nome, ke *Lernejo ne celas religian aŭ ŝtatan profiton sed la infanan.*

Verko kaj Idealo de Ferrer

Oni skribis kaj diris, ke la idealo de Ferrer estis antiklerikalismo, framasonismo. Tio estas eraro sed facile klarigebla. Kelkaj linioj el la revuo fondita de Ferrer tion klarigos:

"En Hispanio la neceseco de l' renoviganta verko de Ferrer estis grava. La analfabeteco estis vasta kaj la superstiĉo regis nekontesteble. Por rimedi je tiu bedaŭrinda stato kreita dum jarcentoj de malbonvolo registara kaj de klerikala superregado la projekto de Ferrer estis samtempe maltima kaj praktika.

En la programo publikigita ĵus de la komenco de sia entrepreno li diris, ke la rolo de Moderna Lernejo estas ricevi infanojn — geknaboj — sub ĝiaj zorgoj kaj ilin eduki por ke ili iĝu liberspiritaj geviroj, verkaj justamaj. Por plenumi tian taskon Moderna Lernejo anstataŭigas la dogman teologian metodon per la metodo racia rezultanta el raciaj sciencoj por alvoki, disvolvigi kaj kreskigi la apartajn ecojn de ĉiu lernanto, por ke fine evoluigante plene la latentan kapablecon de ĉiu infano, tiu ĉi povu fariĝi ne nur utila socio sed ankaŭ, pro tia aparta edukado perulo por pligrandigi la intelektan kaj moralan valoron de l' amaso." (W. Heaford)

Ferrer do kontraŭbatalis precipe ekleziulojn kaj klerikalismen ĉar ili estis baroj sur sia vojiro. Estas necese firme starigi tiun veraĵon ĉar oni miskonus la spiriton de l' Ferrer'a verko, se oni kredus ĝin inspirata nur de antiklerikalisma sektemeco dum ĝi devenis de homara koncepto tiel vasta, kiel ni povas imagi.

Tiu, kiu skribis:

"Ni volas homojn kapablajn por senĉesa evoluado, kapablajn por senĉese detruigi kaj renovigi sian ĉirkaŭaĵon kaj sin mem renovigi, homojn kies intelekta sendependeco stariĝos kiel la plej granda forto, homojn tute sendependajn, ĉiam pretajn por akcepti ion pli bonan, feliĉajn pri la venko de novaj ideoj, kiuj deziras vivi multajn vivojn en sola vivo."

Tiu, kiu skribis tiujn liniojn ne celis krei sekton kies ĉefo li estus, direkti animojn en ia vojo, en ia disciplino. Fidante al homa naturo, libera kaj konscia li nur volis forigi la difektojn de l' kontraŭedukado, la pezan subpremon de l' religiaj kaj sociaj kutimoj. La devizo, kiu ornamis la revuon de li fonditan estis:

"*Infano feliĉa kaj libera.*"

Ni ankoraŭ legu la vortojn, kiuj antaŭas la regularon de l' Ligo de li starigita kaj kiu kunigis la plej altvalorajn kaj liberspiritajn personojn interesatajn pri la edukada problemo en Francio, Svisio, Belgio, Britio kaj Germanio.

"1^a La bazo de l' porinfana edukado devas esti scienca kaj racia; konsekvence ĉiu mistika kaj superracia instruaĵo estas netaŭga.

"2^a Instruado estas nur parto de tiu edukado. Edukado ankaŭ rilatas, flanke de l' elformado de l' inteligenteco, la disvolvigon de l' karaktero, la plifirmigon de l' volforto, la preparon de fizika kaj morala estaĵo ekvilibra, kies kapablecoj estu harmonie kunordigitaj kaj celu al sia plej granda potenco.

"3^a Morala edukado, malpli teoria ol praktika estas konsekvenco de l' ekzemplo kaj sin bazas sur leĝo de solidareco.

"4^a Precipe en instruado por tute juna geknabaro la programoj kaj metodoj devas konveni kiel eble plej zorge al la infana psikologio. Tio nun okazas nek en publika lernejo nek en privata."

Oni komprenos, leginte tiujn dokumentojn, la vastecon de l' idealo de Ferrer, ĝian pedagogian fundamenton.

Plie oni devas kompreni kia estis lia metodo. Li difinis kiajn homojn li volis eduki (vidu supre). Ferrer plue diris: "Socio timas tiajn homojn. Do ni devas pripensi, ke ĝi neniam voĉos al ni doni tian konvenan edukadon por ilin formi." Kaj logike Ferrer fondis sian lernejon ĉar publika lernejo ne kapablis efektive la dezirindan edukadon. Tia estas la fama ekzemplo, kiun Ferrer donis al la proletario. Tion ni volas komprenigi al la edukistoj kaj al la gepatroj: Proletario havos tian lernejon taŭgan por siaj bezonoj, kian ĝi mem fondos.

La ideo de Ferrer fruktodonis. En jaro 1910 malfermiĝis en Lausanne privata lernejo, kiu celis al instruado "laŭ rilato kun la meminfana intereso kaj samtempe kun la bezonoj de l' laborista klaso." Ĝi bedaŭrinde fermiĝis en 1919 pro monmanko; ni reparolos pri tiu entrepreno, kiu

kvankam nedaŭra ne povas esti perdita eksperimento. Ĝi estas kvazaŭ signofosteto. Aliaj fostetoj ankoraŭ estos starigataj, sendube multaj, ĝis la proletariaro, komprenante la ideon de Ferrer, havos siajn lernejojn.

Alia entrepreno en sama spiritedirekto estis la Moderna Lernejo de Clivio en Italio. Tiu lernejo estas nun fermata pro registara ordono sed niaj amikoj sendube sukcesos venki tiun reziston kaj daŭrigi sian bonan verkon. Ankaŭ ni reparolos pri tio.

Alia karakterizaĵo de l'metodo estas la jena: Moderna Lernejo estas racionalema, tio signifas, ke ĝi kontraŭagas mistikismon kaj rivelismon per scienco. Trovinte en Hispanio kontraŭbatalendan klerikalismon Ferrer ne starigis dogmon kontraŭ la religia dogmo. Li nur uzis sciencan kaj tio komprenigas kiel utila estis la fondo de l'eldonejo pri kiu li zorgis samtempe kun la lernejo. La unua legolibreto mem estis laŭscienca. Pri ĝi skribis W. Heaford:

“Laŭ kia mirinda rakontmaniero, kiun la alilandaj pedagogoj povus envii kaj same provi, la majestā historio da l'kosma evoluado, de l'atomo ĝis la penskapbla estaĵo, estas priskribita per lingvaĵo tre simpla kaj facile komprenebla de la infano!”

Dudek miloj da ekzempleroj de tiu legolibreto estis disvendataj. Estas ankaŭ verkita por Moderna Lernejo kaj de ĝi eldonita la “Substancia Universal” kies enhavo detruis en la spiritoj la heredajn kredojn pri miraklo, magio kiuj submetis la tian popolon, kiel timigatajn brutojn, sub la premo de l'ekleziuloj senhontaj kaj ĝuemaj.

La verko de Ferrer do estis kiel plena tuto. Se la ĝenerala direkto estis, vigla agado kontraŭ dogmo kaj superstiĉo, tiam agado staris nur sur firma bazo de la scienco kaj en akordo kun la fama difino: “Oni detruas nur tion, kion oni anstataŭas”. Ferrer vere detruis la malbonan ĝermon de l'dogmatismo purigante la kampon de l'homa spirito, kie tia ĝermo ne plu povis kreski.

Kiaj estis la politikaj opinioj de Ferrer? Ni diris, ke li partoprenis respublikanan ribelon; poste lia spirito evoluis ĝis anarkismo. Sed Ferrer ne estis vere politika ĉefo kaj lia politika agado post lia foriro el la respublika partio estis malgrava, malgrau tio, kion kredigis lia kondamniĝo. Senkulpa en la afero pro kiu li estis kondamnita, Ferrer mem tre bone sciis, ke lia krimo ne estas politika, ke li pagos por sia verko de pioniro de l'edukado popola. Tia pioniro li estis. Tia li estis vigle, arde, fervore.

Vasta estis la tasko. Li ĝin trafis kaj modele plenumis!

E. Stern.

Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Julio-Aŭgusto)

Aŭstrio: Hartmann 500 kr. aŭst. — Ĉeĥoslovakio: J. Repaszky 15 kr. ĉek. — Cuba: M. Rosa 5 fr. fr. — Finnlando: A. Parnanen 40 mk. finnl. — Francio: Boubou 5 fr., A. J. Migny 11 fr., Delacroix 11 fr., J. Mony 1 fr., Callnaud 1 fr., Estour 1 fr., Gabory 1 fr., Chautard 1 fr., Doiteau 1 fr., Voisin 1 fr., Verda Stelo 5 fr., Hugot 1 fr., Migeon 5 fr., Schmitt 6 fr., Bravo Vincent 2,50 fr. fr. Kino Besnard 500 mk. germ. — Germanio: Ort, Rōth kaj Knierin 100 mk., Clemm 10 mk., Dresden, S. R. nia infano, 1^a listo 105 mk., De 2 bulgaroj 8 mk., Dresden, S. R. nia infano 2^a listo 118 mk. Sume: 58,50 fr. fr.; 841 mk. germ.; 40 mk. finnl.; 500 kr. aŭst.; 15 kr. ĉek.

Letero de Romain Rolland⁽¹⁾

Sabato 9 Septembro 1922

Mia kara E. Lanty.

Mi legas en “L Humanité” de la 7^a septembro, ĉe “Petite Kronique” (Kroniketo), la absurdan artikolon 3^a de la Statuto, kiu estis balote akceptata, la 14^a aŭgusto, ĉe la Frankfurta Kongreso. Ĉar vi metis sub mia nomo tiun decidon, kiun mi juĝas tiel netolerebla, kiel kontraŭa al la simpla saĝo, vi devigas min ties publike min malsolidarigi.

Vi tamen bone scias, ke mi ne konsentas pri iu ajn “malpermeso”, ke mi kontraŭstaras ĉiun diktatorecon de partio, aŭ de sektaĉo, kaj ke mi ne pruntas al vi mian nomon por partopreni en tia evidentega atenco kontraŭ la libereco.

Plie, tia malpermeso pruvas, ke la revoluciaj Esperantistoj tute ne konscias pri la grandeco de Esperanto. Esperanto estas, per si mem, revolucio multe pli efika ol ĉiuj t. n. revoluciaj kongresoj: ĉar ĝi kreas, ĝin esprimante, pensmanieron internacian, “sennacieca tutmonda.” La unua devo de ĉiu revoluciano devus esti propagandi Esperanton en ĉiuj klasoj, inokuli ĝin al tiu burĝaro, kiun oni volas konkerti. Pretendi malvastigi esperanton je revolucia grupo estas perfidi esperanton kaj ties ne estas inda.

Mi bedaŭras, esti devigata disiĝi je via grupo. Vi mortigas vian aferon. La mallarĝspiriteco de la revoluciaj partioj estas tre certe mortiga — (por ili, kaj ne por iliaj malamikoj).

Tre kore al vi

Romain Rolland

P. S. — Mi petas vin, konigi mian malaprobacion pri via decido en la proksima n^o de *Sennacieca Revuo*.

Teksto de la artikolo malaprobita: Konforme al artikolo unua, ĉiu S. A. T.-ano ne rajtas esti samtempe membro de iu burĝa kaj t. n. neŭtrala esp.-organizaĵo, nek de iu kontraŭlaborista organizaĵo, escepte en urbo kie ne ankoraŭ ekzistas proletaria esperantista grupo, kaj escepte en okazo kiam la kunlaborado povos doni profiton al nia afero. Ĉiaokaze, li ne rajtas plenumi aktivan oficon en iu ajn burĝa organizaĵo. (Aprobata per 90 voĉoj kontraŭ 29 kaj 78 sindetenoj).

La Rusa Sekcio de E. L. A.

La Rusa Sekcio de E. L. A. estas ne teritoria, sed laŭlingva literatura organizaĵo, ne paralela al E. L. A., sed ĝia nedisigebla parto, fondita por akceli pli sukcesan kaj energian esp. literaturan movadon per diferencigo de la laboro. Kiam montriĝas sufiĉa intereso kaj volo, estas kreata interne de la sekcio iu faklaboro, kiu solidariĝos dezirantojn por plenumo de la starigita tasko. Nun ekzistas 3 fakoj: 1) Bibliografio de rusaj verkoj en Esp., 2) Tradukado de A. Puŝkin—verkaro, 3) Tradukado de L. Tolstoj—verkaro.

Kiel havigi municion al nia Revuo?

Jen unu rimedo. mendi ĉe K. do Jar Petr, Uršovice Nr. 125, Ĉeĥoslovakio, la esperantigitan kanton (kun muziko) de „Ruĝa Standardo“ (eldonita en 1912 de „la Kulturo“). Prezo: 1 kr. ĉekosl., tute por la profito de nia Revuo.

1) Similan leteron R. R. aperigis en “Le Journal du Peuple” (11-Septembro). Mi respondis en la sama gazeto (14-Septembro). En venonta n^o de S. R. mi respondos la ĉi-supran leteron. Hodiaŭ mi nur notu, ke la nuna opinio de R. R. estas verŝajne rezultajo de miskompreno kaj de nesufiĉa informiteco. — E. L.

KRONIKO

Francio

Lyon: Ni ĵus aranĝis "laborigajn promenadojn," kies celo estos pliperfektigi nin en la praktikado de esp-o. Ili okazos ĉiudimanche matene de la 9^h ĝis la 11^h. Ni vizitos la ĉefajn kuriozaĵojn de nia urbo (antikvajn monumentojn, muzeojn k.t.p.) ĉiu el ni, laŭvice, gvidos unu promenadon. Koran inviton al ĉiuj samideanoj; la sola kondiĉo por ĉeesti estos paroli nur esperante. Legu la informojn pri la rendevuoj en la laboristaj gazetoj.

Kunveno de la Grupo ĉiulunde je la 20^a, 6 rue Paul Bert.
Laborista Esp. Grupo

Nederlando

La Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj havis la 9an de Julio sian 7an jarkunvenon, kiu estis bonege vizitata. La raportoj de Sekr.-Kasisto kaj Sekr. Ned. Lab. Esp. Servo estis aplaŭde aprobataj. Plue oni decidis: aranĝi specialan propagandan semajnon (Verdan Semajnon) en la komenco de Septembro, partopreni en la ekzistantan Nederlandan ekzamenan Komitaton, kaj se eble eldoni dumonatan Intermembran Informilon kaj propran lernolibron.

Kiel Sekr.-Kasiston oni reelektis K-don A. Kloek, Iste Sweelinckstr. 19 IIa, Amsterdam, kaj kiel Sekretarion de la Nederl. Lab. Esp. Servo, K-don G. P. de Bruin, Alleeweg, 9, Enschede.

Polio

Varsovio: La 2 Julio, en loĝejo de Liberpensula S-to, okazis Konferenco pri instituo de helplingvo esp-o, kunvokita de Esp. S-to "Laboro," al kiu estis invititaj ĉiuj laboristaj organizaĵoj.

Alvenis deligitoj de sekvantaj asocioj: terkulturaj laboristoj, tramistoj, ledistoj, presistoj, lignaj laboristoj, teksistoj, oficistoj de malsanul-kasoj, komerc-oficistoj, regiona Komitato de Pola Soc. Partio de Praga (antaŭurbo de Varsovio), krom tio multaj gastoj, interesigantaj pri esp. movado.

Post la raportoj de D-ro Ant. Czubrynski ("Pedagogia kaj kleriga signifo de esp.-instruado") kaj k-do Laz. Domoslowski ("Signifo de esp-o por komune-homa kulturo kaj internacia alproksimiĝo de laboristaro") kaj diskutado, oni akceptis diversajn interesajn rezoluciojn, kiujn ni ne povas enpresigi pro manko de loko. — Laŭ komuniko de K^{do} K. D.

Rumano

Cluj: Malrapide, sed tutforte antaŭeniras esp-o en proletariaj rondoj. Ĉi-tie aperanta Fakjurnalo "Börinari Munkás" (Feldindustria Laboristo) entuziasme skribis pri esp-o; en Timișoara komenciĝis kurso, partoprenataj de junlaboristoj, entute 46. Aŭtune plivigliĝos la movado. Enhavo de "For la neŭtralismo!" estas konigita nacilingve. *Satano*

Rusio

Astrahan: Post la parolado de K^{do} Artemjev ĉe tuturba ĝenerala kunveno de poŝtovicistoj enskribiĝis 20 personoj por partopreni esp-kurson. Gvidos la kurson K^{do} Averin. Praktikan kurson jam finis 3 personoj, elementan 4 personoj.

Moskvo: La 2-Junio en Moskva Klubo Esp-ista okazis festena vespero pro la 35a jubileo de l'apero de la unua lernolibro de esp-o. Antaŭparolis S-ro Valentinov. Raportis: S-oj: Demidjuk, Drezan kaj Futerfas. Deklamis s-oj: Deŝkin, Nekrasov kaj Rozenblat.

22-VI. Aperis unua kajero de «La Nova Epoko» (almanakjurnalo) — eldono de samnoma eldonasocio.

25-VI. Nova Kurso ĉe M. Klubo Esp. gvidanto O. Grizonkij.

30-VI. Raporto de s-o Ivanov — Socia rolo de lingvoj naturaj kaj esp-o. Partoprenis S-oj Javoronkov, Venger kaj Valentinov.

10-VII. Fondiĝis akcia esp-Societo, prenanta tutan havaĵon de estinta Moskva librejo «Esperanto».

13-VII. Okazis literatura vespero. S-o Pelakov raportis pri rusa sekcio de E. L. A. kaj N. Nekrasov pri evoluo de esp. lingvo. Deklamis S-oj Deŝkin, Nekrasov, Grizonkij kaj S-no Fejgin. Kantis S-no E. M. Romanoviĉ.

Dum pasintaj 2 monatoj la klubon vizitis esper. el Bulgario, Hungario, Germanio, Ameriko, Anglio k. a. landoj.

23-VII. En Moskvo alyeturis konata esp-sto blindulo Bazilo Eroŝenko el Pekino (Ĉinio), kiu intencis partopreni la XIVan Kongreson.

En Moskvaj blindulaj institucioj: 1) 1-a mezlernejo, 2) 1-a infandomo kaj 3) 1-a muzik-lernejo komenciĝis esp. kursoj. Geblinduloj tre interesiĝas pri esp-o lernas kaj bone sukcesas.

Novaj grupoj kaj kursoj. Ananjev de Ĥersova gub. (Gr.).

Arkadak de Simb. g. Novaj kursoj (30 pers.)

Brjansk. Gr Laboras S-o L. Tregubenko.

Biĥov de Gomela gub. 10-VII. nova kurso ĉe gubprofligo.

Ĉerepovec: esp. informoficejo, sekcio ĉe Sporta klubo; estas eldonata bulteno «La Unuaj Paŝoj».

Vilaĝo Dvorjanskoje de Simb. gub. Gr. «Amikoj de Esp.»

Ĥekaterinoslav. Kursoj en du grupoj (60 pers). Organizigis Klubo «L. Zamenhof».

Zajaĉij Ostrov de Astrahana gub. Kurso.

Igumen de Minska gub. E. estas enkondukita en superaj klasoj de mezlernejoj.

Kinesma, esp. ekspozicio ĉe centra klubo.

Minusinsk de Eniseja gub. Gr. Gvidanto V. Pustinnikov.

Oster de Ĉernig, gub. Gr. ĉe Poŝtoficejo.

Pjatigorsk, esp-o estas instruata en mezlernejoj.

Pugaĉevsk. Gr. ĉe centra klubo de R. K. P.

Ribinsk. Gr. de poŝtovicistoj.

Serpuĥov. Kurso por ĉuvaŝoj, rusoj, hebreoj, tataroj, poloj (42 pers.).

Taraŝĉa de Kurska gub. Gr.

Turinsk. Gr. E. ricevis rajton de loka poŝtista organizaĵo sendadi korespondadojn — senpage.

Tobolsk. S-to. Kursoj. Semajno por agitado.

Ŝostka de Ĉernig. gub. Grupo kaj kurso.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

La Nova Epoko (n^o 1a Junio 1922) *internacia literatur-socia revuo*. Eldonas Esp. Eldonasocio „La Nova Epoko“. Adreso: la Tverskaja-Jamskaja 35, kv. 5, Moskvo (Rusio). Formato: 17 × 22 cm. 16 pg. Dumonata: Prezo nefiksita.

Kun vera ĝojo ni ricevis tiun gazeton. Ne nur ĉar ĝi estas pruvo, ke la ekonomia situacio pliboniĝas en Rusio, sed ankaŭ ĉar ni trovis en tiu nova kunfrato ideojn tute proksimaj de ti-kiujn ni defendas en S. R. Plie, la evoluema stilo pravas, ke la redaktoroj perfekte estras esp.on. El la ĉefartikolo ni represu la jenon:

„... Sennaciuloj, kontraŭmilitistoj, laboristoj, revolucianoj laŭtigas sian voĉon kaj streĉas sian volon al konstruo de nova socio, nova Epoko.

„Ĉu povas ekzisti dubo kaj hezito pri la elekto? Esperanto, mem juna, freŝa, venkosoifa kaj kontraŭdira en la esenco mem al la malnova mondo, sendube devas fariĝi armilo kaj batal-trumpeto por mobilizo de ĉiuj spiritaj kaj materiaj fortoj de la Novo“.

Sed ĉu la ekzisto de nova gazeto ne konkurencas la nian, uni povas sin demandi. Kompreneble tiu punkto estas atentinda. Sed, ĉar la programo de „La Nova Epoko“ estas ĉefe literatura, oni povas ankaŭ opinii necesa la ekzisto de tia organo por kontraŭpezi la influon de la neŭtralaj revuoj literaturaj. Ĉar en S. R. la literatura parto estas nur akcesoraĵo, ni povas almenaŭ noti, ke la respektivaj programoj de la du samcelaj gazetoj neniel konkurencas unu la alian.

Svenska Arbetar-Esperantisten (n^o 1). (Sveda Laborista Esp.isto.) Redaktas Einar Adamson. Adreso: Brynäsgratan 30, Gefle (Svedio). Formato: 17 × 25 cm. 8 pg. Prezo: 15 öre.

Ankaŭ bonvena estu tiu nova kunbatalanto redaktata en esp-o kaj en sveda lingvo, por celoj similaj al la niaj. Ĉi tiu n^o entenas la portretojn de Zamenhof kaj de Liebknecht, kaj tio montras sufiĉe la tendencon de la gazeto.

Aŭstria Esperanto-Raporto (n^o 1). Eldonejo: Wien (Aŭstrio), Mollardgasse 55. Formato: 11¹/₂ × 19¹/₂ cm. 24 pg. Prezo: sv. Fr. — 50.

Tiu kajero entenas sufiĉe objektivan raporton pri la esp. movado en Aŭstrio.

Memornoto. — 1. *Gazetoj tute en esp-o:* Esperanto (7–8), Esp-o-Triumfonta (92 ĝis 101, mankas la n^o 99a), Internacia Komerca Revuo (24, 25, 26), Espero Katolika (129, 130), Vegetarano (4), Nova Eŭropo (6–7), Katolika Mondo (1, 2), Konkordo (3), Esperanta Finnlando (6–7), Teristo (3, 4), Verda Utopio (5, 6), Kristana Espero (2–3), Hispana Esperantisto (58), Espero Teo-

zofia (5-6), Libero (16), La Progreso (5-6, 7), Novaj Tempoj (7-8-9), Litova Stelo (4), Kataluna Esp.isto (6-7), La Unuigita Tuthomaro (Julio-Aŭgusto).

2. *Dulingvaj*: Der Arbeiter Esperantist (7, 8, 9), Belga Esp.to (6-7), Germ. Esp.to (7, 8-9), L'Esperanto (6, 7-8), Bizantio (11-12), La Suda Kruco (23, 24), La Espero (6-7), France-Esp.o (6, 7), Le Monde Esp.te (3), La Semisto (29), Bulletin pour la prop. de l'esp.o (4), The British-Esp.ist (208), La Espero (5), La Verda Ombro (3-4, 5), Antaŭen (5), La Interŝanĝo (13), La Vero (5), Esp.o-Praktiko (7-8), Arguso (9-11), Marto (7), L'Esperantiste Révolutionnaire (2).

3. *Enhavantaj priesp. artikolojn aŭ tradukaĵojn el S. R.*: L'Humanité (Paris, n.o 6713, represas la artikolon de R. Rolland), Sächsische Arbeiterzeitung (Leipzig, 187) sama represo; Volksstimme (Frankfurt a. M., 200) sama represo; Volksblatt (Dresden, 198) Raporto pri nia Kongreso; Unabhängige Volkszeitung (Dresden, 169, 19 5 kaj 198) Artikolo pri S.A.T. kaj raporto pri la Kongreso ktp.; Dresdener Volkszeitung (189); L'Ecole Emancipée (Francio, 42, 43, 44); Auckland Labour News (Anglio, Junio), Le Travailleur d'Eure-et-Loir (Francio, 452, 453, 497); La France du Sad Onest (Bordeaux, 674); Le Syndicaliste des P. T. T. (166, 167, 169); L'Araldo (17); Rudé Pravo (Praha, 143, 179); Boroda (Rusio, 79); Meie Hääl (Talin, 3); Norsk Bokbinder Tidende (Kristiania, 14), The Plebs (London, 8, 9); The Shinaighi (Ĉinio); Travail (Lyon, 17); Rosenheimer Volkszeitung (Germanio, 163); Nova Societade (Rio de Janeiro, 8); Zukunft (Germanio, 85, 88); La Petite Gironde (Francio); Kalmar-Läns-Kurieren (Stockholm, 35); De Tribune (Nederlando, 281); La Voix des Femmes (Paris, 210); Le Journal du Peuple (Paris); Multaj artikoloj pri esp.o kaj S.A.T.

4. *Mondlingvaj*: Bulletin Francais-Ido (45-46), La Moderna Edukisto (4), L'Amiko Idista (15), Suisian Idisto (7-8), Mondo (7), Libereso (7), Kosmoglott (6), La Feuille (7).

Leterkesto:

I. S. (Polio) viaj pripensoj pri artefarita lingvo estas sendube bonaj, sed vi devus direkti ilin al la kontraŭuloj de esp.o, ne al la legantoj de S. R. kiuj jam de longe konvinkigis pri perfekta taŭgeco de artefarita lingvo. — *Red.*

I. G. (Italio) kun granda plezuro ni enpresus raporton pri „fascismo“. Via intenco estis do tre aprobinda. Sed el la 12 paĝoj de via jam ricevita manuskripto — kiom da paĝoj havos la sekvo? — mi konstatis, ke vi ne sufiĉe atentis pri ordigo de viaj ideoj kaj de la faktoj. Gramatik- kaj stilerarojn ni povas korekti, sed tempo mankas al ni por rebonigi vian raporton, kiu bezonas kompletan mallongigan reverkadon. Ni konsilas al vi fari novan provon; penu trafi koncizecon kaj klarecon. Sendu vian duan provon por ke ĝi atingu la redaktejon komence de novembro. — *Red.*

Cours Rationnel et Complet d'Esperanto

Préface de HENRI BARBUSSE

Eldonita de:

Fédération Espérantiste Révolutionnaire
23 bis, Rue Morère, PARIS, 14^e

Ĉiu franclingvano devas nepre posedi tiun lernolibron

Formato: 13 × 20 cm., 208 paĝoj
Prezo: 5 fr. francaj (Afranke: 5 fr. 50)

Atentu!!

Antaŭ ol repagi vian abonon aŭ kotizon, vidu la novan tarifon.

Financa situacio de Sennacieca Asocio Tutmonda

1^a Aprilo 1921 ĝis 31^a Julio 1922

Enspezoj:

En kaso la 1 ^a Aprilo 1921	759,80
Kotizoj de la 1 ^a Aprilo 21 ĝis la 31 ^a Julio 22	1304,55
Subvencioj diversaj	498,55
Libroservo (vendo)	1829,—
Eldonaĵoj de S. A. T. (vendo)	261,85

4653,85

Elspezoj:

Eldonaĵoj de S. A. T. (kosto)	2107,—
Libroservo (aĉeto)	1243,90
Materialo, eldono de Statuto, administra-	
ciaj elspezoj	327,45
Korespondado ordinara	380,25
Diversaj (sendo de pakajoj, jarlibroj,	
membrokartoj ktp.	320,30
Monhelpe al kaso de Sennacieca Revuo	200,—

4578,90

En kaso la 31^a Julio 1922 74,95(1)

Bilanco de Sennacieca Asocio Tutmonda

	fr. fr.	mk. g.
Debitoroj: a) 2 ^a parto de la 1922 jara subvencio de la „Belle-villeoise“	200,—	
„ b) klientoj	405,—	11510,—
Librostoko: a) Tri verkoj de Tolstoj (laŭ kostprezo)	600,—	
„ b) For la Neŭtralismon (laŭ kostprezo)	180,—	
„ c) diversaj libroj (2) laŭ kostprezo)	200,—	
Materialo	100,—	
En kaso la 31 ^a Julio 1922	74,95	1006,—
	1759,95	12516,—

(1) Plus la jena monsumo kiun ni ne ankoraŭ ŝanĝis: 10238 kr. aŭstr., 1545 mk. pol., 488 kr. hung., 119 kr. ĉek., 175 lev. bulg., 300 mk. est., 151 mk. fin., 45 dinar., 28 lev. rum., 32 lir., 17 fr. belg.

(2) Ni posedas ankaŭ stokon da aliaj broŝuroj, proksimume 1800 „Krimoj de Dio“ 250 „Parlamentisma Iluzio“ kaj 800 kolektoj da 7 diversaj poŝtkartoj alegoriaj (5600) kies negocan valoron ni ne povas fiksi, eĉ proksimume.

La fotografajon de la 2^a Kongr. mendu

Grandformato: 24 × 18, sur kartono 2.— fr. fr. aŭ 40.— mk.g.
Poŝtkarta-formato 0,50 fr. fr. aŭ 4,50 mk.g.

Havebla ĉe la Administracio de la Revuo

kaj mendebla nur kontraŭ antaŭpago ĉe:

K^{do}. Luowig Puff, Schwalbacherstrasse 64II, Frankfurt a. M.

Ĉiam legu tre atente la rubrikon:
OFICIALA INFORMILO

Sennacieca Asocio Tutmonda

23. Rue. Boyer, Paris-XX^e

OFICIALA INFORMILO

Celo: Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).

Jarkotizo: minimume valoro de unuhora laborsalajro: = Anglio, 17 pencej; Aŭstrio, 300 kr. a.; Belgio, 2,50 fr. b.; Bulgario, 15 lev.; Ĉeĥoslovakio, 7 kr. ĉ.; Danio, 1,70 kr.; Finnlando kaj Baltaj Landoj, 8,50 Mk. f.; Francio, 2,50 fr. fr.; Germanio, 30 Mk.; Hispanio, 2 pes.; Hungario, 40 kr. h.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Norvegio, 1,70 kr.; Polio, 200 Mk.; Portugalio, 70 cent.; Rumanio, 8,50 lev.; Svedio, 1,70 kr.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cent..

Membreco kun jarabono al «Sennacieca Revuo»: Multoblighu la kotizon per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 30 Mkg., abonanto 100 Mkg., membro-abonanto 120 Mkg.

La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu preferu per naciaj monbiletoj en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole: per monbiletoj, poŝtmandatoj, bankĉekoj ktp. (tiuj-ĉi estu tratablaj en Paris).

La Germanianoj (nur ili) sendu la monon al nia agento en Leipzig — K^{do} F. C. Richter, Sommerfelderstr. 44, — poŝtĉeko 45170; la alilandanaj abonantoj al ni mem en Paris.

*

Inter la 1^a Julio kaj la 20^a Aŭgusto naskiĝis pli ol 225 novaj S. A. T.anoj. Sekve de tiu pliiĝo la tuta membraro nombras hodiaŭ 1386. Ja certe bona progreso, sed nia opinio ne sufiĉe rapida. Ni dezirus ke la proksima Jarlibro entenu almenaŭ 2500 adresojn de Sennaciuloj. Por atingi tiun ciferon, niaj «propagandistoj» devas, jam, nun intensigi sian penadon. Ĉie kien penetris esperanto, tie ekzistas proletarioj esperantistaj... sed ne ĉiuj aliĝis nian asocion; spite nian agadon, (om dank! al bojkotado de preskaŭ ĉiuj esp. gazetoj «neŭtralaj» kontraŭ nia movado) ankoraŭ multe da proletarioj malscias pri ekzisto de S. A. T. Iel aŭ aliel nia propagando devas ilin tuŝi, ĉu per letera korespondado ĉu per sendo de specimeno de nia revuo kaj statuto (sufiĉas sciigi al ni la adreson, kaj tuj ni ekspedas la specimenojn).

*

Tiuj 225 novaj membroj devenas el pli ol 40 urboj diverslandaj. Ĉar la kadro de nia informilo ne povas enteni ties nomenklaturon, ni citu nur kelkajn.

Troyes ĵus akiris sian centan membron, — Leipzig sekvas kun 97, — poste Wien kun 93. Streĉa estas la amika konkurado inter tiuj 3 urboj, kaj danĝera por la 2 unuaj estas la vigleco de la Wien'anoj.

En Paris 11 novaj, — Stuttgart 12, — Berlin 9, — Milano 3, — Dresden 6, — Lyon 3, — Frankfurt 3, — Praha 3, — Mainz 2, — Kladno 2, — Łódź, Warszawa, Prešov, Helsinki, Harkov, London, Burnley, Piotskov po 1, — Lisboa 3, — Nürnberg 2, — Freital-Deuben 2, — Cassel 4, — München 8, — Linz 8, — Breslau 7, — Sofia 4, — ktp.

Novaj fokusoj en Salzburg, 13 membroj (adr.: «Unueco grupo» Saalfelden, Salzburg, Aŭstrio), — en Suŝak, Jugoslavio, 4 m. (adr.: K^{do} Lipić Jozef, poŝtrestanta, Suŝak; — en Zagreb, 6 m. (adr.: K^{do} Ladislav Jankovic, Prezadović 23, Zagreb, Jugoslavio) — en Köflach 3 m. (adr.: K^{do} Krejci Fred., Pichling 90, Köflach, Aŭstrio), — en Timisoara 4 m. (adr.: K^{do} Szemredi Franá-ko, I Merzi 3, Timisoara, Rumanio Barát). — en Mauerkirchen 12 m. (adr.: K^{do} Hartmann Wenzel, Stöckleiten 11, Mauerkirchen, Aŭstrio).

*

Varbiloj. Ĉiu ekzemplero de tiu ĉi N^o entenos unu varbilon. Ĉiu Kamarado utiligu ĝin laŭcele, kaj se unu varbilo ne sufiĉas... nu! sufiĉas peti pluajn al ni.

En tiu ĉi eldono ni enŝovis 2 novajn demandojn, t.e. pri «sindikato profesia» kaj «politika partio». Komprenable, la aliĝanto estas libera respondi aŭ ne al tiuj demandoj, tamen nia opinio, tiuj indikoj estos certe necesaj por iuj statistikoj. Cetere en la dua Jarlibro ni mencios (escepte kiam ni estos ricevintaj or-

donon malan) la «politikan nuancon» de ĉiu membro; tio tre faciligos la oficialajn enketojn, kaj la privatajn informetojn.

Okaze de la ĝenerala voĉdono, ni petos ĉiujn membrojn respondi (sur speciala folio sendata kun la voĉdonilo) al tiuj demandoj.

Kotizo. Jam de longe nia kotizarifto ne aliĝis; tamen dume en kelke da landoj, la ekonomia situacio ŝanĝiĝis tiel ke la laborsalajro tre altiĝis. Originale ni fiksis la jarkotizon laŭ la valoro de unuhora laborpago; memkompreneble la cifero de la kotizo devas sekvi la variojn de la salajro.

Ce la Kongreso ni informiĝis pri la meza unuhora salajro nuna en ĉiuj landoj; ni eksciis ke, depost unu jaro, la salajro triobliĝis, eĉ kvarobliĝis en iuj landoj. Ni do reĝustigis la kotizarifon tiel ke, la monofero estos proksimume egala por ĉiuj membroj.

Ni diras «proksimume egala». Ja, estas malfacila apliki absolute egalecon de ofero, eĉ sur la bazo de la «unuhora salajro», ĉar la proporcio de tiu ĉi kun la vivkosto ne estas sama en ĉiuj landoj. Unu fakta ekzemplo klarigos. Supozu 2 laboristojn: unu en Berlin, aliu en Paris kies pohora salajro estas respektive Mkg. 35 kaj f. fr. 2:0. Nu, la salajro de la dua estas pli reala ol tiu de la unua (senkonsidere la bors-kurson de la 2 valutoj); jes, la aĉetpovo en Paris de f. fr. 2 50 estas supera al la aĉetpovo en Berlin de 35 Mkg.; alivorte, per siaj fr. 2 50 la Paris'ano vivas pli bone (almenaŭ malpli mizere) ol la Berlin'ano per siaj 35 Mkg. Kaj ju pli altiĝos la salajro de la Berlin'ano despli malaltiĝos ĝia aĉetpovo, ĉar la progreso de la salajro estas malpli rapida ol la progreso de la kosto de la vivnecesaĵoj.

Do, se ni aplikus rigore la principon de «unuhora salajro» ni maltrufus nian celon, ĉar la kurzsufierantoj oferdonus pli ol la aliaj; alivorte, la parto de la Berlina Kamarado estus pli peza ol la parto de la Paris'ano.

Problemo tre malsimpla Unufanke: la postulo de la asocia kazo kiu ĉiam ĝemas pro manko da mono; aliflanke: la malriĉeco de la membroj. Kie do troviĝas la solvo?

Laŭ la konsideroj supre priskribitaj, ni modifis la tarifon. Ŝajnas ke, ĝenerale ĝi restarigas la ekvilibron kiun perturbis la lastatempaj skuoj ekonomiaj

Komprenable ĝi ne estas definitiva, ĝi sekvos la saltojn de la salajro.

*

Pago. Malgraŭ niaj petoj kaj avizoj, ni konstatas ankoraŭ ian malakuratecon en la pago de la abonoj kaj kotizoj. Ni avertas la koncernajn Kamaradojn ke, de nun ni sendos n-nion (revuon, membrokarton, jarlibron ktp.) sen antaŭa pago. Tiu severa regulo estas necesega por la bona administrado de nia entrepreno.

*

Skribu legeble. Ofte ni ricevas leterojn skribitajn kvazaŭ hieroglifoj... kaj ni ne scipovas la praegiptan skribmanieron. Ni preferas skribi kure, ol desegni laŭmodele la adresojn.

Eĉ iu kulpulo sendis duan leteron por protesti kontraŭ skribfuŝado niaflanke de lia nomo... kaj la dua modelo ne estis pli legebla ol la unua!! — Alia sendis liston de 10 abonantoj; ni povis deĉifri apenaŭ 6 nomojn kaj adresojn.

Kamaradoj, skribu legeble.

*

Direkta Komitato. Sekve de nia alvoko pri elekto de la Direkta Komitato (vidi la jarlibron, paĝo 35) ni ricevis... unu respondon: la Dresden'a S. A. T.ano prezentas K^{do} Goldstein Josef (librotenisto: Jagdweg 4, Dresden-A.) kiel kandidateton, por la kvara sektoro.

Jam de longe ni decidis okazigi tiun baloton dum novembro 1922. Estos tre bedaŭrinde, se ni devos plue prokrastigi ĝin pro la mallaboremo de la voĉdonantoj. Cetere tro peza por niaj ŝultroj estas la respondeco de la gvidado de S. A. T.; ni preferus elporti nur la materian laboron. Pro tio, ni petegas al la Kdoj aspirantaj al ofico de Komitato *deklari senprokraste* sian kandidatecon.

*

Ĝenerala voĉdono. Konforme al artikolo 26 el Statuto, la tuta S. A. T.ano devas voĉdoni pri la statut-modifoj proponataj de la Kongreso. Por ŝpari tempon kaj monon, la voĉdonoj pri Statuto kaj pri la Direkta Komitato okazos samtempe.

*

Preparo de la dua Jarlibro. Paĝo 38-39 ni alvokis ĉiujn kompetentecojn por fari nian duan pli interesan ol la unua.

K^{do} Jan Zawada, Zamojska 10, Lublin, Polio, sin proponas por gvidi la fakon pri kooperativa movado. Jam de kelkaj jaroj li oficas kiel librotenisto, instruanto kaj sekretario ĉe Laborista

Kooperativo, kaj kunlaboras ĉe koop. ĵurnaloj. Li estas preta verki por nia Jarlibro koncizan historion de la koop. movado tutmonda, kaj starigi diversajn statistikojn. Por tio li bezonas helpantojn seriozajn. Li unue deziras ekrilatiĝi kun ĉiulandaj Kamaradoj kiuj interesiĝas aŭ propagandas por tiu movado. Li petas: ĵurnalojn, bultenojn, jarlibrojn, desegnaĵojn (li scipovas la francan, anglan, rusan, kaj perfekte la germanan, ĉekan kaj polan lingvojn) de la kooperativoj (lokaj aŭ centraj) el ĉiuj landoj.

Sajnas ke tiu fako estos majstre gvidata de nia K^{do} Zawada. Ni do kunigas nian peton al lia, kaj esperas ke li estos helpata en tiu tasko.

Nun ni atendu alispecajn proponojn. Kiu kapablas estri vastan enketon pri... ekz.: nombro de anoj, gazetaro de la komunistaj, aŭ socialistaj, aŭ anarkiistaj partioj en la mondo statistikon pri salajro kaj vivkosto, k. t. p.? — La kompetentuloj ne mankas en S. A. T.; ili nur dormetas. Ilin veku la legado de la ĉefa artikolo de la Julia N^o, t. e. "La spirita vivo de nia presorgaĵo."

*

Adresŝanĝoj: en tiu rubriko ni publikigos ĉiujn ŝanĝojn koncernaj al profesio kaj adreso de la membroj de S. A. T. — Ni konsilas al ĉiuj korekti tuj sian jarlibron.

La adreso de K^{do} Banville d'Hostel (paĝo 90) estas erara; ĝuste estas: 38-bis rue Fontaine, Paris XI.

— K^{do} Donès R., — el Barcelona, loĝas nun en Montrejean (H. G.) Francio, 17 rue Barry.

— adreso nova de K^{do} Sziilki Johan, Budapest: IX Tompa stt. II. II/29.

— adreso nova de K^{do} Vajea V. Vladimír, Wien: XIV Oelweing 5 1/6.

*

La Sekretario de S. A. T.
1^a Septembro 1922

KORESPONDADO

TARIFO: Unu enpresio, 0 fr. 75. — Tri enpresioj, 2 fr. Dek-du enpresioj, 6 fr.

Por kurzsufertantaj landoj 1/3 da aktuala horsalajro.

MALLONGIGOJ: L = *letero*. PK = *poŝtkarto*. PI = *poŝtkartoj ilustritaj*. PM = *poŝtmarkoj*. bfl = *poŝtmarko sur bildflanko*. k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj*. Esp-aĵo = *Esperantaĵo*.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio

K^{do} Josef Eder, Jakominiplaco 14, Graz, pri socia junularo kaj elmigrado.

Belgio

K^{do} Léon Bergiers, 11 rue Lauwers, La Hulpe (province de Brabant). L, PK, k.ĉ.l.

Britio

Brita Ligo de Esp.-Socialistoj deziras ricevi raportojn pri Esp.a kaj Laborista movadoj, vivkondiĉoj, k. c., por presigi en Londona tagĵurnalo laborista. — Cameron, 69 Schubert Road, Putney, London S.W. 15.

Bulgario

K^{do} Kristo Holev, 26 jara fraŭlo, fervojisto, Gara Gabrovo. PK, k.ĉ.l.

Ĉeĥoslovakio

K^{do} Nandor Keller, elektristo, Sobinovaŭl 2, Prešov pri elektroteknikaj aferoj.

K^{do} F. Vičan, Premyslovicu 496, Mar-Hory apud M. Ostrava. PI, L, k.ĉ.l.

K^{do} Antoni Rendl, (21 jara), Plzen-Letna, vilao "Kukačka", prez. de L.A.E. Pri social. lab. movado, pri naturaj belecoj k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Rudolff Tentura, vilao "Kukačka", Plzen-Letna. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l.

K^{do} Francisko Tomásek, Riegerstrato 187, Plzen-Letna. k.ĉ.l.

K^{do} Alois Dolejší, Havličekstr. 129, Plzen-Letna. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Táchav Trba, Jungmanstr. 264, Plzen-Letna. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Eduard Stupka, Jungmanstr. 130, Plzen-Letna. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Jaroslav Brejcha, Jungmanstr. 106, Plzen-Letna. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Francisko Kalmy, n^o 11, Plzen-Lobzy. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Tilhem Prexl, n^o 13, Plzen-Lobzy. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Adalbert Martinek, Ejpovice n^o 55 apud Plzen. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Taclav Liska, Bukoveč n^o 56, apud Plzen. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Taclav Fišer, Nyrany n^o 320, apud Plzen. PM, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Francisko Jukl, Červené Poričí n^o 34, apud Švihov. Pri nat. belecoj, interŝ. PK, L, k.ĉ.l., ĉiam respondas.

K^{do} Antono Zanela, Nyrany n^o 127, apud Plzen. Kun edukistoj de poŝtkolomboj, interŝ. PM kun gesamid. (precipe Paris, Francio), ĉiam resp.

K^{do} Mikael Meiner, Burĝa bierfabriko, Plzen. Pri naturaj belecoj kaj vivrilatoj, k.ĉ.l.

K^{do} Josef Nosek, biera maltfaristo en Mirošov, n^o 64, apud Rokycany. Pri natur. belecoj kaj turismo k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Taclav Todicka, Mestansky pivovar, Plzen. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Mikael Mathauser, Irhanov n^o 62, apud Domazlice. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Jan Petera, Obora n^o 38 apud Ostromer. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Josef Sluka, Schiesglock, poŝto Postcherad, apud Postoloprť. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Francisko Stalder, Svarko n^o 18 p. Letiny apud Blovice. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Jakob Sejkot, Zalezky, poŝto Malenice, apud Tolyne. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l.

K^{do} Taclav Rainer, Drahlín, poŝto Obcenice, apud Prilam. Pri naturaj belecoj k.ĉ.l.

K^{do} Jarko Tondraček, (19 jara), Cervene-Pecky, apud Kolin, deziras koresp. pri arto, muziko, k.ĉ.l. fraŭlinoj.

K^{do} Soukup Jaroslav, Lobry 119, apud Plzeu. PI, k.ĉ.l.

Finnlando

K^{do} Y. K. Kuorikoski, Ruukki Oulun Osuusk. Kun gekam.oj PI, L., k.ĉ.l.

Francio

K^{do} Godard, 9 Rue Mathieu, St. Quen (Seine). PI, bfl, k.ĉ.l.

K^{do} Bonnard, 16 Boul. Gallieni, Aulnay-s. Bois (S. et O.). PI, L, k.ĉ.l.

K^{do} Ehm Marcel, 43 Rue des Batignolles, Paris 17e. L, PK, k.ĉ.l.

K^{do} Maurice Travailé, 1 Rue Planché aux Carpes, Chartres (Eure et Loir).

K^{do} Gaston Saillant, 6 Rue du Bourg, Chartres (Eure et Loir). PI, k.ĉ.l.

K^{do} Lucien Merigot, 12 Rue Porte Guillaume, Chartres (Eure et Loir). PI.

K^{do} André Rougeault, 10 Rue Béguines, Chartres (Eure et Loir). PI.

K^{do} Roger Livet, 15 rue Traversière, St. Jean, Chartres (Eure et Loir). PI.

K^{do} Albert Tanguy, 27 rue de la Couronne, Chartres (Eure et Loir). PI, k.ĉ.l.

K^{do} Henri Courtois, 22 rue des Petites filles Dieu, Chartres (Eure et Loir). PI.

K^{do} Marcel, Potnisky, à Lèves près Chartres (Eure et Loir). PI, k.ĉ.l.

Kdo *Jean Frénaïs*, 32 rue des Petites filles Dieu, *Chartres* (Eure et Loir). Pl.

Kdo *A. Bruyelle*, 29 rue du Coq Français, *Les Lilas* (Seine). k. ĉ. l. Kun gekam.oj pri kontraŭ milit., komun. movadoj, ktp.

Kdo *Soudant*, Instruisto, à *Gomicourt*, Achiet le Grand (P. d. C.) instruistoj k. ĉ. l.

La *Esperantista Grupo* dez. Korespondantojn k. ĉ. l. ĉiam respondos. Pl, L, adr: 9^a Rue Mathieu, *St. Quen* (Seine).

Germanio

Kdo *Just Alfred*, ortopedi-mekanisto, Hohenheimer Str. 54, *Stuttgart*, kun samfakuloj k. ĉ. l. pri laborkondiĉoj.

Kdo *Paul Philipp*, Louisenstr. 1, *Freital-Deuben*. Kun gelab. k. ĉ. l.

Kdo *Friedrich Knittel*, Pillnitzerstr. 23III, *Dresden-A.* k. ĉ. l. Kdoj pri sindikalismo.

Kdo *Jean Karey*, Kurfürstenstr. 5^{1/10}, *Mainz a. Rh.*, Pl, L, k. ĉ. l. pri pol. kaj soc. vivadoj. ĉiam resp.

Kdo *Arn. Wendler*, Harz 45, *Halle a. S.* Pl, k. ĉ. l.

Kdo *Max Schädler*, Prinzenstr. 18, *Halle a. S.* Pl, k. ĉ. l.

Kdo *Kurt Truppe*, An der Moritzkirche 5, *Halle a. S.* Pl, k. ĉ. l.

Grupo de anarkiistaj esperantistoj en Essen serĉas gekorespondantojn ĉ. l. prefere Bakuninanoj: *Frederik Skippe*, Uhlenhautstr. 22, *Essen-Ruhr* (West 4).

Kdo *Richard Blaschke*, *Schweinfurt*. Deziras korespondi PK, bfl.

Niaj grupanoj deziras korespondi kun gek. doj per L, Pl pri laborista vivo, viv- kaj laborkondiĉoj ktp. *Laborista Esperanta Grupo*, *Bitterfeld*, Neustr. 8.

Kdo *Max Gläser*, Friedrich-Wilhelm-Str., *Solingen*. L, PK, k. ĉ. l. pri laborista movado.

Kdo *Erwin Kratz*, M.-Gönraterstr. 18, *Mérscheid b. Solingen*. bele Pl, k. ĉ. l.

Kdo *Max Kilián*, seruristo, Alte Fritzstr. 4, *Erfurt*. L, PK, k. ĉ. l.

Litovio

Kdo *R. Baublys*, *Vilkija*. Pl, L, k. ĉ. l.

Norvegio

Kdo *Hans Aas*, Folkets hus, *Kristiana*. k. ĉ. l. fakorganizitaj laboristoj pri la disvastiĝo de Esp. ĉe la lab. sindikatoj.

Rusio

Kdo *Kalinin Iljo*, Zajaĉijastrov sto., *Volgo Astraĥanj*. Pl, L pri elektroteknikaj novaĵoj k. ĉ. l.

Kdo *Jasak Bazilio*, sama adreso. Pl, L, k. ĉ. l.

Kdo *Fadeev Jakovo*, sama adreso, Pl, L, k. ĉ. l.

Kino *Anna Konratjeva*, sama adreso, Pl, L, k. ĉ. l.

Kdo *A. P. Veliĉko*, Carevskaĵa str 86, gub *Cazicin* dez. koresp. kun gejunuloj k. ĉ. l.

Svedio

Kdo *Sven Sager*, Ö Storg 34, *Jonköping*. Pl, k. ĉ. l.

Kdo *Knut Jensie*, Engsdal 2, *Jonköping*. Pl gaz. k. ĉ. l.

Kdo *Gerhard Wilson*, Andersens Handelstrudgird' *Jonköping*. Pl, k. ĉ. l.

Kdoj, ĉefe el Germanio, atentu!

Okupon serĉas 24 jara junulo, vigla kelnero, parolas iom germane. Demandu vialoke ĉekosl. restoraciojn. Rekompenote. Sciigu: *Jar. Petr*, Vršovice 124, *Praha* (Ĉekoslovakio).

Atentu Gekamaradoj Korespondantoj: skribu legeble viajn adresojn.

Laboristaj, socialistaj kaj internaciistaj organizaĵoj ĉiulandaj kiuj deziras interrilati per esp. kun samaj organizaĵoj de Orienta Liberia Respubliko, skribu pri viaj deziroj kaj proponoj al tiea Centra Esperanto Komitato kaj sendu tekstojn de viaj poresperantaj rezolucioj kaj decidoj, nepre tradukitajn esperanten. Adreso: u. Ĉita, poŝtkesto 36.

Dumonata internacia literatur-socia revuo

La Nova Epoko

Celas havigi originalan kaj esperantigitan internaciinteresan literaturon | Traktas popularforme sociajn kaj scienc-teknikajn problemojn | Konigas laŭeble kaj diskutas plej gravajn kulturproblemojn | Defendas la novan pozicion en Esp. movado, juĝante ĉiujn ĝiajn okazintaĵojn je tiu vidpunkto

Devizo de la revuo estas:

Esperanto servu al la kreado de supernacia kulturo

Aperis N 1 kaj 2

Abonebla ĉe: 1. Esp. eldonasocio „La Nova Epoko“, 1^a Tverskaja-Jamskaja, 35, lg 5, Moskvo (Rusio) — 2. „Sennacieca Revuo“, 177, Rue de Bagnolet, Paris XX (Francio).

Jara abonprezo: fr. fr. 12, g. mk. 150, ŝil. 6, dol. 1,50 Por S. A. T.-anoj $\frac{2}{3}$ de la jara abonprezo por „Sennacieca Revuo“

50:40 cm

Jen la formato de ĉiu paĝo de la ĉiusemajne aperanta (depost novembro 1920) :: Esperantista ĵurnalo

Esperanto Triumfonta

Internacia :: universala :: neŭtrala

Tekstoj en Esperanto

Nuna regula eldonnombro ĉiusemajne ĉ. 4000

==== Abonantoj en pli ol 50 landoj ====

Interesatoj petu senpagaĵajn specimenojn de la ĉefa eldonanto

Teo Jung, Horrem b. Köln (Germ.)

Ĉiu progresema instruisto abonu:

NOVAJ TEMPOJ

Revuo de Popoledukado
redaktata tute en esperanto

Mendu provnumeron al

KDO VITTECOQ, Sassetot
par Bacqueville (Seine-Inf.), Francio

Franclingvanoj atentu!

Jus aperis propaganda broŝuro plifaciligonta la disvastiĝon de la internacia lingvo en francaj revoluciemaj medioj.

En franca lingvo verkita, 36 paĝa, la broŝuro estas bele presita — Kun bildoj sur la Kovrilo.

Ĝi kosta 25 centimojn (afranke 40 centimojn).

Mendu ĝin al:

Fédération espérantiste révolutionnaire
Bourse du Travail de Troyes-Aube

Rabato estas konsentita al ĉiu grupo mendanta pogranda la broŝuron.